

Espero Katolika

D-ro Antonio De Salvo

★ 8.6.1942
Romo



✝ 21.3.2021
Romo

Eksredaktoro de la revuo Espero Katolika kaj eksprezidanto de IKUE

Numero 7-9-2021

Julio-Septembro 2021



Sur la kovrilo: D-ro Antonio De Salvo.

ENHAVO

FORPISIS D-RO ANTONIO DE SALVO	43
PERSISTA PREĜO	47
ĈU VI VOLAS NIAJN MANOJN?	48
SANKTA AMBROZO	49
PARDONO – KURACILO SEN RISKO DE FLANKAJ EFIKOJ	50
LETERO DE LIA SANKTA MOŝTO PAPO FRANCISKO AL FRATO GERARDO FRANCISKO TIMONER OP	54
LIONA ĈEFEPISKOPO: PANDEMIO VEKIS SOPIRON PRI SPIRITA VIVO	57
KARDINALO SEMERARO DUM BEATIGO EN CASAMARI: „LA AMO SUPERAS TIMON“	57
ANTAŬ 20 JAROJ EN STRASBURGO	59
SANKTA LEOPOLDO BOGDAN MANDIĆ	61
SENDU AL MI IUN POR AMI	62
HUMURO DE MAKSO	62
Nova libro: EL MIRINDA MONDO DE DIPTEROJ (Insecta, Diptera)	63
VIRTUALAJ RENKONTIĜOJ DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ	63
LA EŬROPA ITINERO EN ROMO	64
KRISTANA KONGRESO (KADRE DE 70-A KELI-KONRESO)	66
ALEKSANDRAS DAMBRAUSKAS EN LA ANTAŬMONDMILITA AGADPERIODO	67

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italia

Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>

TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italia
IBAN IT34H076010320000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile


Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italia
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03

E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Beloŝević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrik - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

FORPASIS D-RO ANTONIO DE SALVO



La 21-an de marto 2021 je la horo 20:30, post longdaŭra batalo kontraŭ kancero, forpasis frato D-ro Antonio De Salvo, 78-jaraĝa, iama prezidanto de IKUE, eksredaktoro de Espero Katolika, kolono de la E-movado ne nur itala. Niaj preĝoj leviĝas por lia animripozado, dum ni ameme unuiĝas al la doloro de lia edzino Adriana kaj filo Alessandro.

Antonio DE SALVO (naskiĝis la 8-an de junio 1942 en Romo - mortis la 21-an de marto 2021 en Romo) estis doktoro pri juro, juĝisto de la itala Kortumo pri kontoj; dum pluraj jaroj estrarano kaj vicprezidanto de Itala Esperanto-Federacio, iama prezidanto kaj poste kasisto de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kies estrarano li restis ĝis februaro 2012.

ciulo ĉe Ministerio pri Transportoj. Ekde 1976 li estas juĝisto ĉe la itala Kortumo pri Kontoj, komence en Venecio kaj poste en Romo, kie ekde 1977 li kontrolis la agadon kaj reviziis la kontojn de la Ministerio pri Internaj Aferoj, ĝis 2009 kiam li estis levita al rango de ĉefkonsilisto, kun la tasko gvidi la kontroladon de 5 italaj ministerioj (ĉefministrejo, enlandado, eksterlandado, justico, defendo). En 2011 li estis levita al



La familio De Salvo

En 1962 li eklaboris kiel fervoja oficisto (kaj kunlaboris por la enigo de Esperantaj klarigoj en la fervojan horarlibron). En 1969 li doktoriĝis pri juro. En la sama jaro li estis aprobata kiel profesoro pri juro kaj ekonomiko, kaj ekdeĵoris kiel funkciulo ĉe Ministerio pri Publika Instruado. En 1972 li ekdeĵoris kiel funk-



La fraŭla aĝo de Antonio




*Tivoli 1964: Antonio, Catena kaj Edvige
(la tri fotoj el albumo de Edvige Ackermann)*

rango de sekcia prezidanto de la sidejo de itala Kortumo pri Kontoj en Triesto por la fako, kiu revizias kaj kontrolas la kontojn de regiono Friulo-Venecio Julia kaj de la lokaj komunumoj. En marto 2013 li forlasis tiun oficon en Triesto, kaj fariĝis Prezidanto de la Kontrola Sekcio de la Konto-Kortumo en Bolonjo (regiono Emilio-Romanjo). Krome, en 1976 li estis juĝisto ĉe la Regiona Administra Tribunalo en Florenco, kaj li estas sekcia prezidanto de la Regiona Imposta Tribunalo kaj juĝisto de la Tutlanda supera Imposta Tribunalo. Li estas oficiale registrita kiel ĵurnalisto kaj kiel tia akreditita interalie ĉe la itala kaj vatikana poŝt-administracioj.

Antonio De Salvo eklernis Esperanton en decembro 1956 kaj partoprenis sian unuan kongreson en 1958 en Palermo, kie li trapasis triaĝradan ekzamenon pri Esperanto. Jam kiel junulo li aktivis en IKUE

kaj ĝia tiama junulara asocio La Alta Flugo, ekz. kiel kunorganizanto de la IKUE-Kongreso en 1962 en Rocca di Papa. Li tenis kontaktojn kun la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulturo, kiuj rezultigis la agnoskon de IKUE ĉe la Pontifika Konsilio por Laikoj. Li estis redaktoro de revuo *Espero Katolika* ekde 1978 ĝis 1992, kiam profesiaj devoj ne plu ebligis al li plenumi ĉi tiun taskon, kvankam restante ĝis nun unu el ĝiaj ĉefaj kunlaborantoj kaj ĝia respondeca direktoro laŭ la itala leĝo. Krome ekde 1971 ĝis ilia ĉesigo en 2007 li redaktis la esperantlingvajn programojn de Itala Radio Internacia, alinomata Radio Romo aŭ RAI, posteulo de la fama redaktoro Luigi Minnaja. Li estis vicprezidanto de la Itala Esperanto-Federacio. En 1995 li elektiĝis prezidanto de IKUE. En 2003 li retiriĝis de tiu posteno, sed restis en la estraro, unue kiel kasisto kaj direktoro de la Centra Oficejo de IKUE, poste kiel estrarano, konservante la taskon de direktoro de la Centra Oficejo ĝis 2011.



D-ro Antonio De Salvo alparolanta la ĉeestantojn de la 16-a Ekumena E-Kongreso 2003 en Rimini, Italio. La apudstaranta estas Monsinjoro Mariano De Nicoló, la episkopo de Rimini




Fratro Antonio De Salvo kaj la sacerdotoj Duilio Magnani interparolante kun la episkopo de Rimini Mons. Mariano De Nicoló



Li estis vicprezidanto de la LKK de la 91a Universala Kongreso de Esperanto en Florenco, Italio. Pri temoj de filatelio li interalie redaktis specialan broŝuron pri poŝtmarkoj kaj stampoj, en kiuj aperas mencio de Esperanto aŭ esperantlingvaj frazoj, surbaze de sia filatelie kolekto. Li prilaboras, kun internacia grupo de volontuloj, la diĝitigon kaj enretigon de la paperaj tekstoj de la E-elsen-

doj de Radio Romo.

Li kunlaboris en la traduko kaj revizio de la tradukoj en Esperanto de la romkatolika „Meslibro kaj Legajaro“ kaj de romano La Gefianĉoj de Alessandro Manzoni. Li reviziis la vortaron esperanta-itala de Um-



Fratro Antonio leganta la legajon en la sankta meso okazanta kadre de la 16-a EEK en Rimini

berto Broccatelli, kiu aperis en 1984. Ekde la 80-aj jaroj de la 20a jarcento li prizorgis la redaktadon kaj la enkomputiligon de kolosa „Enciklopedia vortaro itala-Esperanto“, kiu estas laŭgrade publikigita en Interreto. El tiu verko ĉerpis prof-ro Carlo Minnaja por la realigo de sia itala-esperanta vortaro. Li ankaŭ kolektis kaj enkomputiligis dekmilojn da proverboj en la itala lingvo kaj en ĝiaj dialektoj, laŭeble kun traduko al Esperanto. ■

eo.wikipedia.org

De Salvo eklernis Esperanton en decembro 1956 kaj partoprenis sian unuan kongreson en 1958 en Palermo, kie li trapasis triagradan ekzamenon pri Esperanto. Jam kiel junulo li aktivis en IKUE kaj ĝia tiama junulara asocio La Alta Flugo. Li tenis kontaktojn kun la Kongregacio pri Sakramentoj kaj Dia Kulto, kiuj rezultigis la agnoskon de IKUE ĉe la Pontifika Konsilio por Laikoj. Li estis redaktoro de revuo Espero Katolika ekde 1978 ĝis 1992. Ekde 1971 ĝis ilia ĉesigo en 2007 li redaktis la esperantlingvajn programojn de Itala Radio Internacia. Li estis vicprezidanto de la Itala Esperanto-Federacio. En 1995 li elektiĝis prezidanto de IKUE. Ekde 2003 li estis estraro de IKUE, ĝia kasisto kaj direktoro de la Centra Oficejo de IKUE, krom multaj aliaj Esperanto-aktivadoj.

Nome de IKUE sendis al la edzino Adriana kaj la filo Alessandro de la forpasinta Antonio jenan kondolencan la prezidantino de IKUE Marija Belošević:

**Estimataj Adriana kaj Alessandro,
akceptu sincerajn kondolencojn okaze de la morto de Antonio.
Lia foriro lasis malplenon en via domo, sed same li multe mankos al ni, la kato-
likaj esperantistoj.
Dum pluraj jardekoj li agis, ofte silente, sed la rezultoj de lia agado estis, estas
kaj restos videblegaj.
Estu certaj, ke ni memoros lin en la preĝoj kaj spuroj de lia agado certe ne
paliĝos.**

**Nome de IKUE, kaj en mia propra nomo al Antonio mi povas nur diri: Dankon!
Dankon por ĉio, kion Vi faris, dankon por kompreno, subteno kaj instigo.
Daŭre de la supro sekvu la agadon de Via kaj nia IKUE!
Ripozu en la paco!
Sincere,
Marija Belošević, prezidantino de IKUE**

La esperantistoj omaĝis al Antonio


IKUE aranĝis du publikajn omaĝvesperojn, al kiuj aliĝis pluraj esperantistoj.

La unua vespero estis preĝa, kaj ĝi okazis ĝuste je la tago de entombigo de Antonio. Oni preĝis por la ripozo de lia animo.

Dum la dua vespero, la 6-an de aprilo oni parolis ĝenerale pri Antonio kaj Esperanto. Same aliĝis pluraj esperantistoj. Carlo Minnaja, kiu amikiĝis kun li dum pluraj jardekoj, memoris pri la unuaj paŝoj de Antonio en E-ujo. Edvige Ackermann per pluraj fotoj de la 60-aj jaroj donis personan ateston pri Antonio kiel bona amiko, kaj ege aktiva esperantisto de la junaĝo dum kiu li partoprenis plurajn E-junularajn aranĝojn.

Interesa estis ankaŭ la kontribuo de Claude Nourmont. Ŝi eĉ ne memoras, ĉu ŝi iam renkontis lin, sed kun granda miro ŝi sekvis lian agadon en la kultura sfero, ĉefe per la ĉiutaga publikigo de la interesajoj ĉe blogo. Unu plia persono same atestis, ke li neniam renkontis Antonion, sed bone ankoraŭ nun memoras lian klaran voĉon de la E-programo de Radio Romo.

Marija Belošević reliefigis lian agadon por IKUE, kaj same donis personan ateston pri lia senlaciga, ĉiampreta kunlaboro. Dum la programo oni prezentis la membiografion de Antonio, kiun li verkis komence de la prezidanteco en IKUE. (mb)




Frato Antonio esprimas omaĝon al la papo Johano Paŭlo la Dua la 3-an de septembro 1997 dum la ĝenerala aŭdienco en Vatikano

PERSISTA PREĜO

Katekizo de la papo Francisko dum ĝenerala aŭdienco la 11-an de novembro 2020
en biblioteko de la Apostola Palaco en Romo

Petu, kaj al vi estos donite, serĉu, kaj vi trovos, frapu, kaj al vi estos malfermite. Ĉar ĉiu petanto ricevas, kaj la serĉanto trovas, kaj al la frapanto estos malfermite. Kaj de kiu el vi, kiu estas patro, filo petos panon, kaj li donos al li ŝtonon? Aŭ se li petas fiŝon, ĉu li anstataŭ fiŝo donos al li serpenton? Aŭ se li petos ovon, ĉu li donos al li skorpion? Se vi do, estante malbonaj, scias doni bonajn donacojn al viaj infanoj, des pli via Patro ĉiela donos la Sanktan Spiriton al tiuj, kiuj petos al Li. (Luk 11,9-13)



Karaj gefratoj, bonan tagon! Ni daŭrigas katekizon pri la preĝo. Iu diris al mi: „Tro vi parolas pri la preĝo. Tio ne estas necesa.“ Jes, estas tio necesa. Se ni do ne preĝas, ni ne havos forton plu vivi. La preĝo estas oksigeno de la vivo. Per la preĝo ni altiras sur nin atentemon de la Sankta Spirito, kiu nin senĉese plu portas. Tial mi tiomfoje pri la preĝo parolas.

Jesuo donis al ni ekzemplon de la senĉesa preĝo *persisteme* praktikata. Lia konstanta dialogo kun la Patro, silente kaj koncentriĝe, estas apogo de la tuta lia misio. La Evangelioj ankaŭ al ni prezentas liajn instigojn al la disĉiploj, ke ili insiste kaj nelaciĝinte preĝu. La *Katekismo* memorigas tri parabolojn de la evangelio de Luko, kiuj emfazas la karakterizon de la preĝo de Jesuo (*komp. KKE, 2613*).

La preĝo antaŭ ĉio devas esti **persista**: kiel la homo en la parabolo, kiu senĉese meze de la nokto petas de amiko tri panojn

por sia neatendita gasto. La amiko rifuze respondas, ĉar li jam kuŝas surlite, sed li insistas kaj insistas, ĝis li devigos lin ellitiĝi por doni al li panojn, pri kiuj li petas (*komp. Luk 11,5-8*). Li malcedeme petas. Sed Dio estas pli pacienca ol ni, kaj tiu, kiu fide kaj persisteme frapas pordegon de lia koro, ne restos elrevigita. Dio ĉiam respondas, ĉiam. Nia Patro bone scias, kion ni bezonas; la sintrudemo ne celas Lin informi aŭ konvinki, sed vivigi en ni sopiron kaj atendemon.

La dua parabolo rilatas vidvinon, kiu sin turnas al juĝisto, por ke li pledu por ŝi. La juĝisto estas senskrupula, sed fine li decidis plenumi peton de la vidvino, devigita per ŝia insistado (*komp. Luk 18, 1-8*). Li diras al si: „Mi faros por ŝi justecon, por ke ŝi ne malfortigu min per sia ĉiama venado.“ Tiu ĉi parabolo komprenigas, ke la fido ne estas iu momenta impulso, sed kuraĝo invoki Dion, ja eĉ „diskuti“ kun Li nerezignante antaŭ malbono kaj maljusteco.

La tria parabolo prezentas fariseon kaj impostiston, kiuj vizitas templon por preĝi. La unua sin turnas al Dio laŭdante siajn meritojn; la dua eĉ ne sentas sin inda eniri sanktejon. Sed Dio ne elaŭdos la preĝon de la unua, do de la fieraj, sed la preĝon de la humilaj (*komp. Luk 18, 9-14*). Ne ekzistas vera preĝo sen humila spirito. Kaj ĝuste la humileco nin kondukas, ke ni petadu perpreĝe.

La instruo de la evangelio estas klara. Estas necese senĉese preĝadi, eĉ se ĉio sin

montras kiel vana, ŝajnas, ke Dio estas surda kaj muta kaj ke temas nur pri la perdo de la tempo. Eĉ se la ĉielo estas obskurigita, la kristano ne ĉesas preĝi. Lia preĝo estas paralela kun fido. Kaj la fido en la vivo povas ofte ŝajni kvazaŭ iluzio kaj senefika penado. Dum nia vivo ekzistas malhelaj momentoj, kiam la fido ŝajnas esti iluzio. Sed praktikadi preĝon signifas akceptadi ankaŭ ĉi tiun penadon. Iu povas diri: „Patro, mi preĝadas kaj mi sentas nenion... mi havas aridan koron.“ Sed eĉ dum tiuj momentoj ni devas daŭrigi, kiam ni sentas nenion. Multaj sanktuloj kaj sanktulinoj spertis nokton de la kredo eĉ silentadon de Dio – kiam ni frapas kaj Dio ne respondas – sed la sanktuloj persistis.

Dum tiuj ĉi noktoj de la kredo neniam estas sola tiu, kiu preĝas. Jesuo ja estas ne nur la atestanto kaj majstro de la preĝo, Li estas pli. Li nin inkluzivas *en sian preĝon*, por ke ni povu preĝi en Li kaj pere de Li. Kaj tio estas verko de la Sankta Spirito. Tiukaŭze nin la evangelio instigas peti Patron en la nomo de Jesuo. La sankta Johano alportas tiujn ĉi vortojn de la Sinjoro: „Kion ajn vi petos en mia nomo, tion mi faros, por ke la Patro estu glorata en la Filo.“ (Joh 14,13) La *Katekismo* eksplikas, ke „la certeco de la elaŭdo de niaj petoj baziĝas sur la preĝo de Jesuo“ (KKE, 2614). Tiu donas al la homa preĝo flugilojn, kiujn ĝi ĉiam sopiris havi.

Kiel do ne menci i vortojn de la 91-a psalmo, plenajn de fido, fontantaj el koro, kiu ĉion atendas de Dio: „Per Siaj plumoj Li ŝirmos vin, kaj sub Liaj flugiloj vi rifuĝos, Lia fideleco estas ŝildo kaj kiraso. Ne timu la teruron de nokto, nek sagon, kiu flugas tage, nek peston, kiu iras en mallumo, nek epidemion, kiu ekstermas tagmeze.“ (Psa 91,4-6) En Kristo tiu ĉi belega preĝo plenumiĝas, en Li ĝi trovas plenecon de sia vero. Sen Jesuo al niaj preĝoj minacus, ke ili reduktiĝus je homaj strebadoj, plej ofte destinitaj por malsukceso. Sed Li surprenis ĉiun vokon, ĉiun ĝemon, ĉiun jubilon, ĉiun insis-

tan peton... ĉiun homan preĝon. Ne forgesu, ke en ni preĝas la Sankta Spirito, Li gvidas nin al preĝo kaj alkondukas nin al Jesuo. Li estas donaco, kiun donacis al ni la Patro eĉ la Filo por vojo al renkontiĝo kun Dio. Kiam ni preĝas, tiam en nia koro preĝas la Sankta Spirito.

Kristo estas por ni ĉio, ankaŭ en nia vivo de la preĝo. La sankta Aŭgusteno tion diras per impresa esprimo, kiun ni trovas ankaŭ en *Katekismo*. Jesuo „por ni preĝas kiel nia sacerdoto, Li preĝas en ni kiel nia kapo; ni preĝas al Li kiel al nia Dio. Ni do ekkonadu niajn voĉojn en Li kaj lian voĉon en ni.“ (KKE, 2616) Tial la kristanon, kiu preĝas, nenio timigas, li konfidas sin al la Sankta Spirito, kiu estis donacita al ni, Li petas en ni kaj instigas nin al preĝo. La Sankta Spirito, la Majstro de la preĝo, nin gvidu kaj instruu preĝi. ■

Laŭ la Ĉeĥa Sekcio de la Radio Vatikana

ĈU VI VOLAS NIAJN MANOJN?

Sinjoro, ĉu vi volas miajn manojn por pasigi ĉi tiun tagon helpante la malriĉulojn kaj la malsanulojn, kiuj tion bezonas?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi miajn manojn.

Sinjoro, ĉu vi volas miajn piedojn por pasigi ĉi tiun tagon vizitante tiujn, kiuj bezonas amikon?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi miajn piedojn.

Sinjoro, ĉu vi volas mian voĉon por pasigi ĉi tiun tagon parolante kun tiuj, kiuj bezonas amajn vortojn?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi mian voĉon.

Sinjoro, ĉu vi volas mian koron por pasigi ĉi tiun tagon amante ĉiun homon nur pro tio, ke li estas homo?

Sinjoro, hodiaŭ mi donas al Vi mian koron.

Patrino Tereza

SANKTA AMBROZO

Kobo¹ tre ŝatis vizitadi sian onklon Vojteĥon kaj lian grandan ĝardenon, en kies plej malproksima parto, sub la grandega tilio, staris dek abeloj. Somere la knabo ne aliradis tro proksimen, por – kiel parolis la onklo – ne eniri la vojon de abeloj. Nun tamen regis ĉi tie trankvilo, kaj la abeloj staris superŝutitaj de neĝo.

“Onklo, ĉu la abeloj en vintro dormas?” – demandis li scivolulo. “Abeloj verdire ne eliras el abelujo, kiam estas malvarme, sed ili ne dormas tiel kiel ursoj.” “Do ili devas ege enuiĝi” – rimarkigis Kobo. “Vi ekmirus, kiom da laboro ili havas. Jam en novembro ili komencas pretiĝi por transdaŭri vintron. Ili akomodiĝas malvaste en la similan al globo vintran bulon. En ĝia interno, kie estas plej varme, troviĝas la abelreĝino. Sendepende de la temperaturo ekstere, en la bulocentro ĝi egalas ekde 18 ĝis 20 gradoj”, klarigis la onklo.

“Sed kio ilin varmigas?” – demandis la knabo. “La abeloj frotas per segmentoj de siaj abdomenoj, kaj la energion donas al ili la mielo, kiun ili formanĝas. En marto, kiam la patrino komencos demeti ovetojn, en la abelujo devas esti ĉirkaŭ 36 gradoj, do la abeloj devos moviĝi multe pli, por ke estu pli varme. Mi esperas, ke sufiĉos al ili mielo kaj ke nenio timigos ilin” – diris zorgeme la onklo.

“Do, ĉu la abeloj timas?” – ekmiris Kobo, ĉar li rememoris, kiel efika armilo de insektoj estas la pikilo. “La abeloj devas havi trankvilon, ili ne ŝatas bruon” – parolis la onklo. “Ĉu vi gardas ilin?” – volis scii la knabo. “Mi inspektas ilin kune kun Ambrozo” – respondis la onklo. “Ĉu Ambrozo estas via najbaro?” – demandis Kobo.

“Ne tute. Sankta Ambrozo estas la patro de abelistoj” – ridetis la sinjoro Vojteĥo. “Ĉu li kulturis abelojn?” – ekinteresiĝis Kobo. “Ne, li estis episkopo, sed li havis

kun abeloj la nekutiman aventuron. Kiam li naskiĝis, kaj okazis tio antaŭ longe, en la tempo de romia imperio, la abelsvarmo ek- sidis sur lia buŝo” – rakontis sinjoro Vojteĥo.



*Claude Vignon, Sankta Ambrozo, 1623,
Minneapolis-instituto de la arto*

“Nu, ne ŝercu, vi onklo!” – teruriĝis la knabo. “Lia panjo ankaŭ estis terurita kaj volis forte forpeli ĉi tiun abelaron, sed la patro de la infano ordonis atendi kaj baldaŭ la abelaro mem leviĝis kaj forflugis. La patro post ĉi akcidento diris: ‘Se ĉi tiu bebo vivos, ĝi estos iu gravulo!’ . Oni opiniis, ke Ambrozo estos granda oratoro. Kaj efektive tiel okazis. Li iĝis episkopo, en regado li estis milda, sed justa kaj bonvolema. La predikojn li parolis tiel fervore, ke lin aŭskultis kun ravitemo eĉ nekredantoj. Sub la influo de liaj paroloj konvertiĝis sankta Aŭgusteno, pli posta episkopo de Hipono.” “Mi ne konis Ambrozon, sed en somero mi petos lin, ke

nenia abelo piku min” – certigis Kobo. “Kaj nun alia afero, ni iru al la onklino por trinki teon kun mielo”, invitis Kobon la onklo. “Abeloj, laboru en trankvilo!”

¹ Kobo – karesformo de Jakobo. ■

*Verkis Joanna Wieliczka-Szarkowa
Esperantigis Stanisław Śmigielski*

PARDONO – KURACILO SEN RISKO DE FLANKAJ EFIKOJ

Akiri pacon kaj havi la pacon en tiu ĉi vivo kaj antaŭ ĉio en la morto, tio estas ebla nur pere de pardono. Celo de la pardono do estas la interna paco, la paco en la koro.

La pardono estas tre grava ĝuste en la rilato al niaj proksimuloj! Johano Paŭlo la Dua diras: „Proponu pardonon, ricevu la pacon.“

Pri kio fakte temas en tiu ĉi artikolo? Temas pri mia persona pardono de la „kulpulo“ al mia proksimulo, de tio, kion li kaŭzis al mi, per kio li vundis min, per kio li iĝis mia „ŝuldanto“. Tie ĉi estas necesa mia pardono. Kaj mia pardono estas la vojo al mia interna paco, kaj per tio al mia ekstera resaniĝo.

En lernejo de la vivo devas esti la pardono deviga lernobjekto! Ni povas ellerni pardonadi! Aŭ per parolo de kuracisto: la pardono estas „recepto“. En kontraŭmeto al pure psikoterapie orientitaj kursoj estas mia instrua kurso bazita biblie kaj koncentrita al Kristo, ĝi estas psikohigieno sur la kristana bazo.

Unue estas necese klarigi nociojn:

- pardono kaj malkondamno estas du vortoj por la sama agado;
- pardonon kaj paciĝon estas necese diferencigi.

La pardono estas unuflanka: persono 1 pardonas al persono 2. Paciĝo estas reciproka, ambaŭflanka: persono 1 pardonas al persono 2 kaj persono 2 – kvazaŭ en kon-

traŭtirado – pardonas al persono 1.

Pardoni al niaj „kulpuloj“ estas ĉiam ebla. Repaciĝo kun niaj „kulpuloj“ ne devas ĉiam sukcesi, se tiu dua ne estas volema aŭ jam mortis. Ni devas plu pardonadi ankaŭ al la mortintoj, kiuj nin dum la vivo ofendis.


Nia paciĝo kun Dio estas ĉiam ebla. Dio ĉiun homon amas kaj pardonas al li. Dio estas senlime mizerikorda.

Paciĝo kun mia Mi, kun mi mem estas ankaŭ ĉiam ebla. El tio rezultas nelimigita sinakceptado, antaŭkondiĉo por sukceso de nia vivo.

Esenco de la pardono ne estas forgesi, enbalai sub tapiŝon, pasive lasi preterpasi. La pardono estas nenio pasiva. La pardono estas io aktiva. En tiel aktiva faro de la pardono mi vidas tri ŝtupojn:

1-a ŝtupo: preterlasi, fordoni, do pardoni sen kristana fono. Pardoni el pure raciaj kaŭzoj, eĉ tio estas gajno. Se la pardono estus olimpika konkuro, estus por tiu ĉi unua ŝtupo bronza medalo. Malfermita restas la demando: „Kien“ for tion mi donas? Malfermita ankaŭ restas: Kiu prizorgos la justecon? Kiu punos mian kaŭzanton, mian „kulpulon“?

2-a ŝtupo: preterlasi, fordoni, redoni, transdoni. Tiu ĉi ŝtupo enhavas, „kien“ mi donas, kaj tiel estas ĉi tie inkludita ankaŭ fordoni, transdono: transdono al Jesuo – sur la krucon. La ŝarĝon de la ĝisnuna nepardono transdoni al Li, poste Jesuo Kristo portas



la ŝarĝon. Jesuo Kristo zorgas pri la justeco kaj mizerikordo por ambaŭ flankoj. Tial mi ne devas la kulpulon, kaŭzanton puni. Jesuo Kristo estas ankaŭ ununura, kiu povas resanigi la vundojn, kiujn mi suferas pro maljusteco: Jesuo Kristo estas la Kuracisto. La pardono por la kristano do estas direktita al Jesuo. Ĉar mi amas Kriston, mi pardonas, tiel kiel Kristo pardonas al mi, ĉar Li min amas. La pardono estas senkondiĉa amo. La pardono komprenita laŭ Biblio estas unusignifa biblia tasko, nenio pli unusignifa ekzistas! „Patro, pardonu al ni niajn kulpojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj kulpantoj.“ „Pardonadu reciproke, kiel ankaŭ Dio pardonis al vi en Jesuo Kristo.“ La pardono disŝiras miajn negativajn ligojn al la vundinta persono kaj al la suferita maljustaĵo. Tiel estas kaj pardono kaj liberiĝo: mi donas liberecon al mi mem, mi donas liberecon al miaj „kulpantoj“, mi donas liberecon al Dio, mi donas al Dio liberan spacon, por ke Dio povu libere efiki je mi kaj ankaŭ je mia „kulpanto“ per sia amo kaj mizerikordo. Ne nur mi, la vundito, bezonas Dian helpon, Dian amon, Dian mizerikordon, ankaŭ mia „kulpanto“ bezonas Dian helpon, Dian amon, Dian mizeri-



kordon. En olimpiado de la pardono tio respondas al 2-a ŝtupo de la arĝenta medalo.

3-a ŝtupo: transpreni, konfesi, oferi, danki. Kiel katolika kristano mi povas mian

pardonagon ankoraŭ pli perfektigi. Tiel mi devus aldone transpreni kiel mian devon taskon de peranto. Kiel peranto de mia „kulpanto“ alpaŝi antaŭ Dion kaj peti pardonon por liaj kulpoj kaj vundigo de la amo rilate al mi, kiel tion faris Kristo: „Patro, pardonu



al ili, ĉar ili ne scias, kion ili faras“, aŭ Stefano: „Patro, ne alkalkulu al ili tiun pekon.“ Tiel mi povas preĝi por mia „kulpanto“ kaj beni lin: „Benu tiujn, kiuj vin malbenas!“ Mi forstrekas kulpon sur mia asignilo; mi forbruligas mian ŝuldateston, mi pardonas al li lian kulpon, mi ne alkalkulas ĝin al li: „Kompatu, Sinjoro, vian servanton, liberlasu lin kaj pardonu al li lian ŝuldon.“

Tiu ŝtupo enhavas ankaŭ konfesion de miaj kulpoj, de miaj ĝisnunaj nepardonoj kaj iliaj konsekvencoj, kiel estas kolero, malamo, rankoro. Mi konfesos ilin antaŭ Dio en pekkonfeso. Mi ankaŭ povas doloron de mia vundiĝo, malsano, ĉagreno kunigi kun suferado de Kristo kaj oferi ilin al la Patro pere de Sankta Spirito. Kaj mi ne forgesu danki al Dio por lia graco, ke Li donis al mi la forton, ke mi povis pardoni, kaj danki al Li por la beno, kiun Li al mi pro mia pardono promesas. Tiel mi alportas sur la teron iom da ĉielo! Tio estas la vera sekvo de Kristo. Ora medalo!

La pardono estas ĉiam ago de la volo, de la libera decido. „Mi volas pardoni!“

La pardono ne estas feliĉega torento de emociiĝo! La pardono ĉiam postulas mian volon, sed fine ĝi estas Dia graco. Pri tiu ĉi graco de pardonpovo mi devas persiste peti. Kaj pardonadi estas la Dia volo kaj Dio tiun ĉi preĝon elaŭdos. Ŝarĝo de nepardono estas terura mizerstato, ĉi tie mi povas al Dio „krii“ pri la helpo: „Sinjoro, helpu al mi en mia nepardono!“

La pardono estas laboro, postulas penon, ofte ankaŭ larmojn. Ni ne forgesu komenci per mallonga preĝo: „Sinjoro, helpu al mi pardoni! Venu, la Sankta Spirito, sanigu, kio estas vundita!“

Kiel mi progresas plej bone ĉe tiu „laboro“ de la pardono, por ricevi tri menciitajn ŝtupojn? Plej bone estas antaŭiĝi laŭ demandoj:

Al kiu mi devas pardoni? Ĉiam celante, direkte al difinita persono kaj situacio, neniam sendistinge, ĝeneralige. Preparu listojn, plej bone tri diversajn: de la personoj, al kiuj vi devas pardoni, de la situacioj, en kiuj vi mem devas pardoni, kaj de la problemoj, pri kiuj vi plendas antaŭ Dio.

Kion mi devas pardoni? Ĉion! Ekzistas neniu escepto!

Kiam mi devas pardoni? Laŭeble tuj! S-ta Paŭlo al Efesanoj rekomendas ankoraŭ en la sama tago. Ol la suno subiros, plej malfrue vespere en la vespera preĝo. Nur tiel ni povas morgaŭ komenci novan tagon. Valoras ankaŭ pardoni ĝustatempe, nenion

nepardonitan kunpreni en la tombon, ĝi estu nek en la koro nek en la testamento. Ni devas konsciiĝi, ke la morto povas alveni tute subite. La mortado povas esti tre malfacila, se nin premas ŝarĝo de la nepardonitaĵo. Ĉe la mortado ni povas esti ankaŭ malfortaj, ke ni ne plu havos forton aŭ bezonatan konscion. Tial mia urĝa konsilo: Pardonadi frutempe dum la vivo. Se ne estas ebleco rapide pardoni, ĉar la vundigo estas tro granda, estas ĉi tie bezonata tuja kaj insista preĝo.

Kiel ofte mi devas pardoni? Kristo respondas al demando de Petro: sepdekoble sep fojojn.

Tiom koncize miaj rekomendoj por rapidaj kaj simplaj kazoj, kiujn mi konsciiĝas, ke ili postulas pardonon. Sed ekzistas ankoraŭ pluj nomoj, situacioj kaj problemoj, pri kiuj mi tuj ne konsciiĝas. Ĉar multe da nepardonita estas ankaŭ dronita en subkonscio. Ni eble ekmemoros: Tion mi jam antaŭlonge forgesis. Kaj ĉi tie atendas danĝero: forgesita, sed ne pardonita.

Tia „forgesita nepardono“ dormas en la subkonscio. Kaj la nekonsciataj nepardonoj estas amara radiko por multaj negativoj. La negativaj fruktoj de la „amaraj radikoj“ estas ekzemple negativaj atendoj, trosentemo, agresemo, koleremo, indignemo, malmoleco, malvarmeco, „ŝtona koro“. La homoj, kiuj je tio malsanas, okupas atendejojn de psikoterapiistoj. Eble ili tie trovos helpon, sed ne resaniĝon.



„Resaniĝo“ de tio plej frue nekonsciiĝinta postulas tempon kaj preĝon. Sed la resaniĝo estas ebla nur pere de la pardono. Por tio mi urĝe rekomendas kelktagajn spiritajn ekzercojn kun ĉefa celado al „interna resaniĝo“, kiun gvidas sperta spirita gvidanto. La Sankta Spirito poste malkovras kaj Jesuo resanigas. La kuracisto estas Jesuo! Tio do estas mia recepto: spiritaj ekzercoj, sed ne „trankvileco“.

Ni ellernis, ke la pardonado estas la devo. Kiel estas ĉe mala flanko, ĉe nepardono?

Kion kaŭzas nepardono? Ĉu mi povas permesi al mi ne pardoni? Nepardono malutilas al mi mem. Nepardono ŝarĝas per ĉenoj, konstruas murojn, malmoligas koron kiel ŝtonon, kaŭzas la negativajn ligojn. Sen la pardono ekestas multaj problemoj, por kiuj mankas helpo. Se mi ne pardonas, kreskas en mi amaraj radikoj. Kaj tiuj amaraj radikoj min fine igos amara. Se mi ne pardonas, plu mi restadas en kaptiteco, kunligita, kunkatenita. Se mi ne pardonas, mi plenlarĝe malfermiĝas al la korpaj kaj animaj malsanoj.

La ekkono devas signifi: Mi ne povas al mi permesi ne pardoni.

Mi ankaŭ devas ĉiujn pli fruajn nepardonojn kaj nepaciĝojn konfesi en pekkonfeso antaŭ Dio kaj bedaŭri ilin kiel la pekojn kontraŭ la amo kaj peti por ilia pardono.

Nepardono formas senfinan diablan cirkon, en kiu diablo en ĝusta senco de la vorto ludas sian senfinan ludon: la vundito estas unue „kompatinda ofero“, sed li restos ofero, ĝis kiam li ne pardonos. Ĉar kio estas pli malbona, li nun ankaŭ mem estas krimulo! Ekzistas malnova psikologia regulo: nur vunditaj vundigas, nur tiuj, kiuj estis damaĝitaj, damaĝas, nur humiligitaj humiligas. Kiel nerepaciĝinta homo plu vundigas, de li vundita ree vundigas pluajn ktp., tiel la diabla cirklo ne havas finon, ĝi plu daŭrigas en familioj kaj tutaj generacioj.

Ĉe multaj korpaj malsanoj, precipe ĉe tumoroj, povas la nepardono esti kaŭzo, aŭ eĉ la ĉefa kaŭzo de tio. En senco de tuteca medicino validas, ke ĉe ĉiuj korpaj malsanoj ni povas esplorserci la nerepaciĝintajn situaciojn.

Ni rigardu fine al tiu pli bela flanko de la afero. Ellerni pardoni, ekzerci en la pardonado kaj fine pardoni povas esti tre utila por nia vivo!

La pardono estas terapio, estas tio „memkuracado“. La pardono kiel spirita terapio estas ago de „spirita inteligencio“. Pardonu signifas sanigi. Rezultoj de la sciencesploroj estas unusencaj: la pardono kaj repaciĝo malaltigas sangopremon kaj ŝparas la koron. La pardono estas la plej bona profilaktiko kontraŭ korinfarkto kaj multaj korproblemoj. La pardono mildigas ĥronikajn dolorojn de vertebraro, liberigas muskolstreĉon, mildigas vertiĝojn, lacecon, depresion, malaltigas superpezon. La homoj kapablaj pardoni pli rapide refreŝiĝas el streso kaj kolero. En ĝusta senco de la vorto validas: La pardono alportas disfloron.

La gajno el la pardono estas ĉiuflekta:

- la sano danke al evitado aŭ resaniĝo de certaj simptomoj de la malsano;
- la paco kun la homoj, kiuj nin vundis;
- la paco kun si mem, la paco kun Dio; libero kontraŭ negativaj interligitecoj;
- la rememoroj sen doloro, sen malamo, sen kolero kaj amareco, sen larmoj.

Sed la plej belan konkludon donas al ni sankta Francisko en sia Kantiko de la kreitaĵoj: „Laŭdata estu, mia Sinjoro de tiuj, kiuj pardonas pro via amo.“

Pardonu pro la amo al Kristo kaj por pli granda gloro de Dio! Tio estas la ora medalo! ■

Helmut Renner (El Der Fels 6/2009)

Mi forviŝis viajn kulpojn kiel nubon, kaj viajn pekojn kiel nebulon; revenu al Mi, ĉar Mi savis vin. *Jes 44,22*

LETERO DE LIA SANKTA MOŝTO PAPO FRANCISKO AL FRATO GERARDO FRANCISKO TIMONER OP, ĜENERALA MAJSTRO DE LA ORDENO DE LA PREDIKANTOJ, OKAZE DE LA 800-A DATREVENO DE LA MORTO DE LA SANKTA DOMINIKO

Al frato Gerardo Francisko Timoner OP, la ĝenerala majstro de la Ordeno de la Predikantoj

Prædicator gratiæ – inter la titoloj atribuitaj al sankta Dominiko, la „Predikanto de la graco”, aparte konformas al la karismo kaj la vokiĝo de la Ordenoj, kiujn li fondis. Ĉijare, okaze de la 800-a datreveno de la morto de sankta Dominiko, kun ĝojo mi akompanas la Predikantajn Fratojn esprimante dankon pro la spiritaj fruktoj de tiuj ĉi karismo kaj vokiĝo, videblaj en la riĉeco de la dominikana familio, kiu kreskis dum la jarcentoj. Mi sendas preĝan saluton kaj bondezirojn al ĉiu membro de tiu ĉi granda familio, kiu ampleksas la kontemplan vivon kaj la apostolan agadon de ties monaĥinoj kaj ordenaj fratinoj, ties pastraj kaj laikaj frataroj, ties laikaj institutoj kaj ties junulara movado.

En la Apostola instigo *Gaudete et exultate*¹ mi esprimis la konvinkon, ke „ĉiu sanktulo estas misio planita de la Patro por speguli kaj montri en la konkreta momento de la historio iun parton de la Evangelio”². Dominiko respondis al la urĝa bezono de siaj tempoj ne nur de renovigita kaj vigla predikado de la Evangelio, sed – kio estas same grava – esti konvinka atestanto de ties alvoko al sankteco en la viva unueco de la Eklezio. En la spirito de la veraj reformoj li strebis al la reveno de la malriĉeco kaj simpleco de la plej frua kristana komunumo, kunigita ĉirkaŭ la apostoloj kaj fidela al ilia instruo³. Samtempe lia fervoro savi la animojn kondukis lin formi korpuson de dediĉitaj predikantoj, kies amo al la Sanktaj Skriboj kaj honesteco de la vivo kapablis lumigi mensojn kaj varmigi korojn per la vi-

vodona vero de la Vorto de Dio.

En niaj tempoj, karakterizataj de epokfaraj ŝanĝoj kaj novaj defioj por la evangelia misio de la Eklezio, Dominiko povas do servi kiel inspiro por ĉiuj baptitoj, kiuj estas vokitaj, kiel misiistoj-disĉiploj, atingi ĉiun „periferion” de nia mondo per la lumo de la Evangelio kaj la favorkora amo de Kristo. Parolante pri la daŭre aktuala imago kaj karismo de sankta Dominiko, papo Benedikto la 16-a rememorigis al ni, ke „en la koro de la Eklezio ĉiam devas bruli la misia fajro”⁴.

La granda vokiĝo de Dominiko estis prediki la Evangelion de la favorkora amo de Dio kun la pleneco de ties sava vero kaj elaĉeta povo. Kiel studanto en Palencio li aprezis, ke neapartigeblaj estas fido kaj karitato, vero kaj amo, honesteco kaj kompato. Kiel diras al ni beata Jordano de Saksujo, kortuŝita de la granda nombro de homoj, kiuj suferis kaj mortis pro la severa malsatego, Dominiko vendis siajn valorajn librojn kaj kun modela bonkoreco fondis hospicon subtenatan per almozoj, kie povis manĝi la malriĉuloj⁵. Lia atesto pri la kompatemo de Kristo kaj la deziro provizi per la saniga balzamo tiujn, kiuj spertis materian kaj spiritan malriĉecon estis la inspiro por fondi vian Ordenon kaj formi la vivon kaj la animzorgadon de sennombraj dominikanoj en diversaj tempoj kaj lokoj. La unueco de la vero kaj la karitato esprimiĝis eble plej bone en la dominikana skolo de Salamanko, precipe en la agado de frato Francisko de Vitorio, kiu proponis kadron por la internacia juro, kiu baziĝis sur la universalaj homaj rajtoj.

Sekve, tio fariĝis filozofia kaj teologia bazo por la heroa laboro de fratoj Antonio Montesinos kaj Bartolomeo de Las Casas en Amerikoj kaj Dominiko de Salazar en Azio, kiuj defendis la dignon kaj la rajtojn de la indiĝenoj.

La evangelia mesaĝo de la neŝanĝebla digno de la homoj, kiel de la gefiloj de Dio kaj la membroj de unu homa familio, estas en niaj propraj tempoj la defio por la Eklezio fortigi la ligojn de la socia amikeco, superi la maljustajn ekonomiajn kaj politikajn strukturojn kaj labori por la kompleta disvolviĝo de ĉiu homo kaj ĉiu popolo. Fidele al la volo de la Sinjoro kaj sub la gvido de la Sankta Spirito la disĉiploj de Kristo estas vokitaj kunlabori ĉe ĉiu peno „naski novan mondon, kie ĉiuj estus gefratoj, kie estus loko por ĉiu, kiun la socio forĵetis, kie brilus justeco kaj paco”⁶. La Ordeno de la Predikantoj, same kiel ĉiam, estu pioniroj de la renovigita proklamado de la Evangelio, kiu parolas al la koroj de la viroj kaj la virinoj de niaj tempoj kaj starigas en ili soifon pri la veno de la regno de Kristo, Lia sankteco, justeco kaj paco!

La fervoro de sankta Dominiko pri la Evangelio kaj lia deziro pri la aŭtentika apostola vivo kondukis lin emfazi la gravecon de la vivo en komunumo. Ankoraŭfoje, beata Jordano de Saksujo priskribas al ni, ke fondante vian Ordenon, Dominiko intence elektis „esti nomata ne subprioro, sed frato Dominiko”⁷. La idealo de frateco estis esprimita per la inkluziva formo de mastrumado, laŭ kiu ĉiu partoprenas en la procedo de rekonado kaj decidado, konforme al sia rolo kaj aŭtoritato, pere de la sistemo de kapituloj en ĉiuj niveloj. Tiu ĉi „sinoda” procedo ebligis la Ordenon alĝustigi sian vivon kaj vokiĝon al la ŝanĝiĝanta historia kunteksto, konservante la fratan komunumon. La ekzemplo de la evangelia frateco, profeta atesto de la fina plano de Dio en Kristo pri la repacigo kaj unuigo de la tuta



La Madono transdonas rozarion al sankta Dominiko. Skulptaĵo de la tirola skulptisto Josef Mersa ĉ. 1905 en St. Ulrich en Gröden

homa familio, restas fundamenta elemento de la dominikana karismo kaj kolono de la streboj de la Ordeno antaŭenigi la renovigon de la kristana vivo kaj disvastigon de la Evangelio en niaj tempoj.

Kune kun sankta Francisko de Asizo, Dominiko komprenis, ke la predikado de la Evangelio *verbis et exemplo*⁸ postulas la konstruadon de la tuta eklezia komunumo en frateca unueco kaj misia disĉipleco. La dominikana karismo de predikado frue abundis kaj instigis fondiĝon de la diversaj branĉoj de la pli granda dominikana familio, kiu ampleksis ĉiujn klasojn en la Eklezio. En la sekvaj jarcentoj ĝi talente montriĝis en la verkoj de sankta Katarina de Sieno, la pentraĵoj de beata frato Anĝeliko kaj la karitata agado de sankta Roza de Limo, sankta Johano Macias kaj sankta Margareta de Castello. Kaj same

en niaj tempoj ĝi inspiras laboron de artistoj, universitatoj, instruistoj kaj prelegantoj. En tiu ĉi jubilea jaro ni ne povas forgesi tiujn membrojn de la dominikana familio, kies martireco mem estis potenca formo de predikado. Nek la sennombrajn virojn kaj virinojn, kiuj imitante la simplecon kaj la kompatemon de sankta Marteno de Porres portas la ĝojon de la Evangelio al la periferioj de la socioj kaj de nia mondo. Ĉi tie mi aparte memoras pri la silenta ekzemplo, kiun montras pluraj miloj de dominikanaj laikoj kaj membroj de la Dominikana Junulara Movado, kiuj spegulas la gravan kaj ja nepran rolon de la laikoj en la laboro de animzorgado.

Okaze de la Jubileo de la naskiĝo de sankta Dominiko al la eterna vivo mi volas aparte esprimi dankemon al la Predikantaj Fratoj pro ilia elstara kontribuo, kiun ili faris por la predikado de la Evangelio per la teologiaj esploroj de la misteroj de la kredo. Sendante la unuajn monaĥojn al la fondiĝantaj universitatoj en Eŭropo, Dominiko agnoskis la gravecon provizi sekvajn predikantojn per klara kaj firma teologia formado, kiu baziĝas en la Sanktaj Skriboj, respektas la demandojn starigatajn de la racio kaj preta partopreni disciplinitan kaj respekteman dialogon servante la malkaŝon de Dio en Kristo. La intelekta apostolado de la Ordeno, ĝiaj multaj lernejoj kaj sciencaj institutoj, ĝia kultivado de la religiaj fakoj kaj ĝia ĉeesto en la kultura mondo stimulis la renkontiĝon inter la fido kaj la racio, nutris la vivecon de la kristana kredo kaj antaŭenigis la vokiĝon de la Eklezio altiri mensojn kaj korojn al Kristo. Rilate al tio mi ankaŭ nur povas ripeti mian dankemon pro la historio de la servo de la Ordeno al la Apostola Seĝo, kiu komenciĝis jam ĉe Dominiko.


Dum mia vizito en Bolonjo antaŭ kvin jaroj mi estis benita povi pasigi kelkajn momentojn preĝante antaŭ la tombo de sankta

Dominiko. Mi preĝis precipe por la Ordeno de la Predikantoj, petante por ĝiaj membroj la gracon de persistemo en la fideleco al ilia fundamenta karismo kaj al la grandioza tradicio, kies heredantoj ili estas. Dankante al la sanktulo pro la tuta bono, kiun liaj filoj kaj filinoj efektivigis en la Eklezio, mi petis, kiel la apartan donacon, la signifan kreskon de la pastraj kaj la ordenaj vokiĝoj.

La celebrado de la Jubilea jaro superŝutu per donacoj la Predikantajn Fratojn kaj la tutan dominikanan familion, kaj komencu novan printempon de la Evangelio. Kun granda amo mi konfidas ĉiujn partoprenantojn de la jubilea celebrado al la amaj porpetoj de Nia Sinjorino de la Rozario kaj de via patriarko – sankta Dominiko, kaj mi sendas mian elkoran Apostolan benon kiel burĝonon de la saĝeco, la ĝojo kaj la paco en la Sinjoro.

En Romo, ĉe sankta Johano en Laterano, la 24-an de majo 2021

FRANCISKO



Tradukita en Esperanton la 25-an de majo 2021 de Miĥaelo Rikardo Balicki („La Liturgio de la Vorto”).

¹ esp. „ĝoju kaj jubilu” (Mat 5:12)

² n-ro 19

³ kp. Ago 2:42

⁴ aŭdienco la 3an de februaro 2010

⁵ Libellus, 10

⁶ Fratelli tutti, 278

⁷ Libellus, 21

⁸ esp. „per vorto kaj per ekzemplo”

LIONA ĈEFEPISKOPO: PANDEMIO VEKIS SOPIRON PRI SPIRITA VIVO

Laikeco signifas neŭtralecon de la ŝtato en plurisma socio. Kontraŭ tio hodiaŭ realigata forŝovado de religio el la publika kampo ne estas laikeco, sed propago de ateismo, diras primaso de Galio dum interparolo por Radio Europe 1.

Liona ĉefepiskopo Olivier de Germay konstatis, ke solvo de la problemo de radikalaj islamismoj en Francio ne povas esti preteksto por forŝovado de religio randen. La ateismo estas elekto, kiun oni devas respekti, sed ĝi ne povas esti entrudigata al ceteruloj, ĉar tiomomente okazas negado de la vero pri homo kaj malrekonado de rajto je spirita dimensio.

La ĉefepiskopo Germay ankaŭ atentis, ke la pandemio kondukis multajn homojn al trovo de spirita vivo kaj reveno al fundamentaj demandoj, kun kiuj ili sin turnas al la eklezio. „Tiuj ĉi esperoj kunigitaj kun la eklezio ne dependas de ni. Ni ne vekigadis ilin. Estas tio esperoj, kiuj simple en la homa koro estas. Hodiaŭ dum la kriza tempo, kiu estas ne nur sanitara krizo, ekaperis forta sopiro pri la spirita vivo, kiu komencas eĥiĝi. Ni estas surprizitaj, kiel multaj homoj nuntempe sin turnas al la eklezio. En tio estas granda



La liona ĉefepiskopo Olivier de Germay

paradokso. Unuaflanke ni estis devigitaj redukti niajn renkontiĝojn kaj duaflanke ni estas atestantoj de la renovigita intereso, homoj frapas pordegon de la eklezio rekonnante, ke ĉi tiu krizo venigis ilin al konstato, ke en la vivo ne estas grava nur tio, kio estas materiala, sed ke ekzistas ankaŭ io alia, ke ekzistas pli gravaj aferoj. Ankaŭ ni kiel eklezio danke al tio pli bone konsciiĝas, ke ni havas en la nuna mondo tre gravan mision,“ diras la ĉefepiskopo Olivier de Germay dum interparolo por Radio Europe 1. ■


Vatican News, 10.4.2021

KARDINALO SEMERARO DUM BEATIGO EN CASAMARI: „LA AMO SUPERAS TIMON“

La prefekto de la Kongregacio por Kanonizo, kardinalo Marcello Semeraro, la 16-an de aprilo 2021 en abatejo Casamari, situanta ĉ. cent kilometrojn sude de Romo, solenis beatigan liturgion de cistercianaj martiroj el fino de la 17-a jarcento, la honorindan Simone Cardon kaj kvin liajn kunulojn, inter kiuj estas ankaŭ ĉefdevena sacerdoto Jan Chryzostom Dominik Zavřel

O.Cist., la martiro de Eŭkaristio.

La dominikano Jan Zavřel devenis el Chodov en ĉefdiocezo de Prago kaj instruis teologion en roma monaĥejo de la sankta Sabino. Kun permeso de superioro li transiris en la jaro 1776 al cistercianoj de la trapista reformo en Casamari, kie li unu jaron pli poste okazigis voton kaj baldaŭ li iĝis prioro kaj pli poste novicmajstro.



Kiam la 13-an de majo 1799 (la tago de la liturgio de la novbeatuloj) invadis la abatejon franca armeo, revenanta el Napolo, kaj malgraŭ bona akcepto komencis pirabi la monaĥejon, la patro Zavřel dufoje kolektis disŝutitajn hostiojn – unue en preĝejo kaj poste en monaĥeja kapelo, kie li kun du siaj kunfratoj adorpregis. Ĉi tie ilin surprizis ebricitaj soldatoj kaj dum la patro Zavřel la trian fojon strebis savi la Plejsanktan Sakramenton, li estis pere de glavo murdita. Li mortis kun vortoj: „Jesuo, Maria“.

Kiel en homilio menciis kardinalo Semeraro, „la novaj beatuloj ne estis militantoj eĉ ne komiksaj herooj, sed tute normalaj, timemaj kaj vundemaj homoj, kiel ni ĉiuj precipe dum la nuntempa pandemio, kiu ankaŭ en Casamari havas siajn viktimojn (mortis ĉi tie ankaŭ abato Eugenio Romagnuolo). La tiama abato antaŭ la franca armeo fuĝis al Palermo kaj la beatigata prioro Simone Cardon unue sin antaŭ la soldatoj kaŝis en legoma monaĥeja ĝardeno, sed kiam li vidis sorton de siaj kunfratoj, li revenis“.

Tiel la prefekto de la Kongregacio por Kanonizo konkludis, ke ankaŭ nia vivo de la kredantoj „neniam restos sen spirita batalo.

Ekzistas nome neniam facilaj kristanismo. (...) Neniu el ni povas persisti en sekvado de Kristo sen suferoj kaj konfliktaj situacioj, sed la perfekteco de la spirita vivo baziĝas en agnosko de la senlima Dia amo kaj la propra malforteco.“ El tiu ĉi perspektivo, daŭrigis la kardinalo Semeraro, ankaŭ ni devas rigardi atestojn de la novaj beatuloj, kaj ĉe tio fidi pri la zorgo de la Patro. Sed dume ni devas vigli, ĉar kiel saĝe atentigas la sankta Ignaco en siaj Spiritaj Ekzercoj (315,325), „la malamiko pligrandigas nian timon por paralizi nian liberon kaj nin malproksimigi de Dio. Nur se ni alpaŝos antaŭ Dion en la tuta nia malforteco, ni ellernos ne subiĝi al timo, sed ni permesos al Dio nin ami, kio estas komenco de la kredo“, konkludis la prefekto de la Kongregacio por Kanonizo en itala Casamari. ■

Radio Vaticana

Jesuo estas la ŝtono, kiun vi konstruantoj malŝatis, kaj kiu fariĝis ŝtono bazangula. Kaj en neniu alia estas savo, ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo, donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj.

Ago 4,11-12

ANTAŬ 20 JAROJ EN STRASBURGO

La Ekumena Ĉarto estas komuna dokumento inter la Konsilio de Episkopaj Konferencoj de Eŭropo kaj la Konferenco de Eŭropaj Eklezioj, kiu enhavas gvidliniojn por la kreskanta kunlaboro inter la Eklezioj en Eŭropo. Fundamenta dokumento ellaborita de 250 delegitoj de la kontinento, duone respondecaj pri Eklezio, la alia duono junuloj, kun celo konservi kaj disvolvi fratecon inter la Eŭropaj Eklezioj kaj alfronti la defiojn de la Kontinento. Subskribis ĝin la prezidantoj de la menciitaj ekleziaj organizaĵoj la 22-an de aprilo 2001 (dimanĉo post Pasko) okaze de la eŭropa ekumena kunveno en Strasburgo: kardinalo Miloslav Vlk, ĉefepiskopo de Prago kaj prezidanto de la Konsilio de Episkopaj Konferencoj de Eŭropo kaj metropolitano Jeremias Kaligiorgis, prezidanto de la Konferenco de la Eŭropaj Eklezioj - 120 ortodoksaj kaj protestantaj eklezioj.

Dokumento enhavanta gvidliniojn por kreskado de kunlaboro inter ili, estas rezulto de pacienca kaj saĝa laboro, kiu komenciĝis dum la unua Eŭropa Ekumena Asembleo, okazinta en Bazelo en la jaro 1989.

La dokumento difinas planojn kaj engaĝigojn:

1. Respondi al voko al unueco de la kredo,
2. Prediki kune la Evangelion,
3. Iri renkonten,
4. Agi, aktivi kune,
5. Preĝi kune,
6. Daŭrigi la dialogojn,
7. Helpi formi Eŭropon,
8. Repacigi popolojn kaj kulturojn,
9. Protekti la kreitaron,
10. Profundigi komunecon kun judaismo,
11. Zorgi pri rilatoj kun islamo,
12. Praktiki renkontiĝon kun aliaj religioj kaj mondkonceptoj.

Ĉi rilate sekvas engaĝigoj:

- defendi rajtojn de malplimultoj;

- protekti fundamentajn valorojn kontraŭ iu ajn atako;
- rezisti provojn, klopodojn ekspluati religion kaj Eklezion;
- serĉi senperfortan solvon de konfliktoj;
- plibonigi kaj fortigi kondiĉojn kaj egalecon de virinoj;
- iniciati, antaŭenpuŝi, promocii, stimuli justan komunecon inter virinoj kaj viroj en la Eklezio kaj en la socio;
- disvolvi respondecan kaj subteneblan vivmanieron;
- agnoski religian liberecon kaj konscion de individuoj kaj komunumoj, por ke ili povu praktiki sian religion aŭ mondkoncepton;
- esti malfermitaj al dialogo kun homoj de bona volo, atestante la kristanan kredon.



Kardinalo Miloslav Vlk kaj Metropolitano Jeremias subskribas la Ekumenan Ĉarton

„La unueco, por kiu la Sinjoro preĝis dum la Sankta Vespermanĝo, estas unu kondiĉo de fideindeco de la kristana atesto. Hodiaŭ ankoraŭ pli ol antaŭe ni devas fondi nian prikonsideron je ĉi tiu profunda raporto (rilato), kiu plenumas decidan rolon, kiun povas havi kristana mesaĝo en la mondo.“ – kun ĉi tiuj vortoj alparolis Johano Paŭlo la 2-a kardinalon Miloslav Vlk, ĉefepiskopon de Prago, en mesaĝo unu tagon antaŭ la subskribo de la Ekumena Ĉarto. Temas pri preteco per unu dokumento stimuli ĉiujn nivelojn de la

vivo de Eklezioj, ekumenan kulturon de dialogo kaj de kunlaboro. Oni transdonis ĝin la saman tagon al la delegacio de junaj kristanoj de Eŭropo.



LA VOJO DEVAS DAŬRIGI

Eŭropo travivas epokan krizon de ekonomio, klimato, migrado, pandemio, kiuj trafas „la valorojn kaj principojn de civitana kunekzistado kaj la homa solidareco“.

Eklezioj respondecas „pri serĉado de la paco, justeco kaj de la protekto de la kreitaro, humana frateco kaj komuna bono.

MULTO RESTAS FAREnda

La vojo estas stabilita, ĝi devas esti gardata kaj nutrata, por ke ĝi estu fermento de unueco kaj repaciĝo „por ke ili estu unu“ (Joh 17,21).

Post 20 jaroj ekde ĝia subskribo, en perio-



La Ekumena Eklezia Tago en Berlino 2003

do de konfuzo, por ĉiuj nekutima, malfacila, kiu postulas dediĉi sin al akcepto kaj espero, la Ekumena Ĉarto evidentiĝas kiel lumturo, kiu en ĝia evangelia esenco helpas al kristanoj vivi en lumo de konstruo de unuiĝo en Eŭropo kaj tiel anonci kune, ke „Jesuo Kristo, la Sinjoro de unu Eklezio estas nia plej granda espero de repaciĝo kaj paco. En lia nomo ni volas daŭrigi en Eŭropo nian vojon kune. Dio akompanu nin kun la Sankta Spirito.“

DATREVENO DE LA EKUMENA ĈARTO

Memorigo de la Konsilio de Episkopaj Konferencoj de Eŭropo kaj la Konferenco de Eŭropaj Eklezioj.

Okaze de la 20-a datreveno de la Ekumena Ĉarto eldonis kune kardinalo Angelo Bagnasco, prezidanto de la Konsilio de Episkopaj Konferencoj de Eŭropo kaj reve-rendo Christian Krieger, prezidanto de la Konferenco de la Eŭropaj Eklezioj, deklaron. En ĝi oni dankas al Dio „por la paco“, kiun ni spertas en ĉi tiuj jaroj kaj por „konkeroj de la Ekumena movado entute“.

La 22-an de aprilo 2021 inter la 19-a kaj la 20,30-a horo ili ambaŭ partoprenis retan, video-ekumenan renkontiĝon.

Kardinalo Bagnasco mem prezentis aktualaĵojn de la dokumento. Datreveno de ĝia subskribo okazas en momento maltrankvila kaj drama - dum la pandemio, kiu kaŭzas profundajn sociajn kaj ekonomiajn malfacilaĵojn, aparte ankaŭ en Eŭropo.

Unu konkreta ekzemplo de la ekumena frateco dum lastaj jaroj estis humanecaj koridoroj, al kiuj ili kontribuis.

Bonaj humanecaj iniciatoj devas daŭrigi. Ili estas monopolo de neniu, sed devo de ĉiuj. ■

*Por EK preparis laŭ itala gazetaro
Jitka Skalická, Romo*



SANKTA LEOPOLDO BOGDAN MANDIĆ

* 12-a de majo 1866 – † 30-a de julio 1942

Ni devas nur admiri kaj danki la Sinjoron, kiu hodiaŭ proponas al la Eklezio iun tiel apartan figuron de oficanto de la sakramenta graco de Repaciĝo, kiu unuflanke vokas la pastrojn al servado de tiel kerna graveco, de tiel aktuala pedagogio, de tiel senkompara spiritualeco, kaj kiu memorigas al la fideluloj, jen fervoraj, jen malvarmetaj, jen indiferentaj, kia providenca kaj neeldirebla servo estas ankaŭ hodiaŭ, eĉ hodiaŭ pli ol iam, por ilia persona kaj aŭda konfeso, fonto de graco kaj de paco, lernejo de kristana vivo, senkompara konsolo en la surtera pilgrimado al la eterna feliĉo.

Beata Papo Paŭlo la sesa

Homilio por la beatproklamo de patro Leopoldo (la 2-an de majo 1976)



La grandeco de patro Leopoldo estas alie: en la forofero, en la sindono, tagon post tago, por la tuta tempo de lia pastra vivo, nome dum 52 jaroj, en la silento, en la deteniĝemo, en la humilo de konfeseja ĉelete: „La bona paŝtisto fordonas sian vivon por la ŝafoj“.

Patro Leopoldo estis ĉiam tie, preta kaj ridetanta, saĝa kaj modesta, diskreta konfidanto kaj fidela patro de la animoj, respektema majstro kaj komprenema kaj pacienca spirita konsilanto. Se oni volus lin difini per unu sola vorto, kiel dum lia vivo faris liaj pentofarantoj kaj kunfratoj, tiam li estas „ilia konfesanto“... Tamen ĝuste en tio estas lia grandeco, en tiu lia malapero por havigi lokon al la vera Paŝtisto de la animoj. ■

Sankta papo Johano Paŭlo la Dua.

Homilio por la sanktulproklamo de patro Leopoldo (la 16-an de oktobro 1983)

Tradukis: Antonio De Salvo

Aranĝo: IKUE&MB (2016)

SENDU AL MI IUN POR AMI

Sinjoro, kiam mi malsatas,
donu al mi iun, kiu bezonas nutraĵon;
- kiam mi soifas,
sendu al mi iun, kiu bezonas trinkaĵon;
- kiam mi sentas malvarmon,
sendu al mi iun por varmigi;
- kiam mi havas ĉagrenon,
proponu al mi iun por konsoli;
- kiam mia kruco fariĝas peza,
igu min kundividi la krucon de alia;
- kiam mi estas malriĉa,
gvidu min al iu, kiu estas en bezono;
- kiam mi ne havas tempon,
donu al mi iun, kiun mi povu helpi dum
kelkaj momentoj;
- kiam mi estas humiligita,
faru, ke mi havu iun por laŭdi;
- kiam mi estas senkuraĝiĝinta,
sendu al mi iun por kuraĝigi;

- kiam mi bezonas la komprenemon de la
aliaj,
donu al mi iun, kiu bezonas la mian;
- kiam mi bezonas, ke oni okupiĝu pri mi,
sendu al mi iun por prizorgi;
- kiam mi zorgas nur pri mi mem,
altiru mian atenton al alia persono.

Patrino Tereza

Instruu min silenti pri miaj malsanoj
kaj malbonfartoj; ili plioftiĝas, kaj ĉiujare
plifortiĝas deziro paroli pri ili.

Instruu min trovi en homoj neatendi-
tajn talentojn kaj, Sinjoro, donu al mi fa-
voran donacon ilin montri al aliaj.

Gardu min kontraŭ tentoj, ke ĉiuokaze
mi diru ion ajn.

s-ta Tereza el Akvino

Humuro de Makso



Ho, kara kolego, mi aŭdis, ke vi estas fame konata kardiologo!

Ilustraĵo de Jan Heralecký

Nova libro: EL MIRINDA MONDO DE DIPTEROJ (Insecta, Diptera) Oldřich Arnošt Fischer

La ordo Diptera (Dipteroj) apartenas al la plej multenombraj insektaj ordoj. En la Ĉeĥa Respubliko troviĝas pli ol ok miloj kaj en la tuta mondo eĉ 122 miloj da konataj specioj. La libro *El Mirinda Mondo de Dipteroj (Insecta, Diptera)*, kiu havas nur 79 paĝojn, estas nek atlaso nek lernolibro de entomologio. Ĝi informas pri specioj de la Ĉeĥa Respubliko kaj atentigas pri iliaj signifoj. Koloraj fotoj estas koncize komentataj. Malofte uzataj fakaj esprimoj estas klarigitaj.

Jam en antikva epoko kelkaj grupoj de dipteroj apartenis al konataj molestantoj de homoj kaj paŝtiĝantaj bestoj (Eliro 8, 12-27), sed sciencistoj malkovris signifon de dipteroj, kiuj kapablas transmisi kaŭzantojn de infektaj kaj parazitaj malsanoj. Kelkaj specioj de dipteroj damaĝas plantojn kaj stokitajn nutraĵon kaj furaĝon. Larvoj de granda amaso da dipteroj evoluas en mortaj korpoj de plantoj kaj bestoj kaj fekaĵoj reduktante biomason kaj helpante al cirkulado de materio en la naturo. La dipteroj estas nutraĵo de multaj bestaj specioj. Parazitismo estas ofta strategio – en la libro estas menciitaj la specioj, kiuj parazitigas en nestoj de sovaĝaj abeloj kaj krabroj. Sed inter la dipteroj estas ankaŭ superparazitaj: la parazitaj de aliaj parazitaj. La dipteroj, kiuj vizitadas florojn, estas signifaj polenantoj. Larvoj de sirfedoj



Oldřich Arnošt Fischer

EL MIRINDA MONDO DE DIPTEROJ (Insecta, Diptera)

voras folilaŭsojn (afidojn), eĉ kaŝe vivantajn subterajn folilaŭsojn, kiuj suĉas sur radikoj de plantoj.

Scio de dipteroj estas necesa por pli bona kompreno de vivanta naturo.

Baldaŭ la libro estas mendebla en interreta librovendejo de Esperantista Klubo Brno:

butiko@esperantobrna.cz,
<https://butiko.esperantobrna.cz>

VIRTUALAJ RENKONTIĜOJ DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

La katolikaj esperantistoj el diversaj landoj ne nur de Eŭropo regule renkontiĝadas pere de la virtuala ZOOM-platforno sub gvido de la IKUE-prezidantino fratino Marija Beloŝević. Bonvolu ankaŭ vi, karaj gefratoj, partopreni en tiuj ĉi renkontiĝoj, kiuj dumtempe bone anstataŭas la antaŭajn personajn renkontiĝojn, kunvenojn kaj eĉ kongresojn ktp. La regulaj renkontiĝoj kun la rozaria preĝo okazas ĉiusemajne kaj dum la monato majo, dediĉita al la Virgulino Maria, ĉiutage. Partoprenu ankaŭ vi, kara leganto, por elpeti baldaŭan malaperon de la pandemia situacio kaŭzita de Kovim-19.

La interesatoj pri la partopreno bonvolu vin anonci ĉe IKUE reto, por ricevi bezonatajn alir-informojn: ikue.reto@gmail.com

LA EŬROPA PILGRIMO EN ROMO

Pilgrimado en Romo okaze de la 50-a datreveno de diplomaciaj rilatoj

La iniciato “Iter Europaeum“ – “La Eŭropa Itinero”, la projekto lanĉita de la Eŭropa Unio okaze de la 50-a datreveno de la starigo de formalaj diplomaciaj rilatoj kun la Sankta Seĝo – komencis la 9-an de majo 2021 en Romo. Temas pri la tago nomita “Eŭropa Tago” aŭ “Schuman Tago“, datreveno de historia deklaro de Robert Schuman, la franca ministro pri eksterlandaj aferoj. Li proponis en la jaro 1950 en la fama deklaro kreon de eŭropa komunumo de karbo kaj ŝtalo kaj desegnis trajtojn kaj fontojn. Lia propono estas konsiderata la naskiĝtesto de la Eŭropa Unio.

La festo daŭros pli ol unu monaton ĝis la 27-a de junio por fortigi kaj profundigi la ligilojn. “La promonado”, kiu ideale trairas la tutan Eŭropon laŭ vojo de historio kaj diplomatio, dialogo kaj ekumenismo. Ĝi kunigas la 27 membrolandojn kaj iliajn referencajn preĝejojn en Romo, la koro de la kristanismo.

LA TITOLO EN LA LATINA POR MEMORI KARLON LA GRANDA

La elekto de la titolo en la latina ne estas hazarda. Du kialoj: la unua, ligita al la mal-facila elekto de komuna lingvo por la membroŝtatoj; due la fakto, ke la latina referencas memoron pri Karolo la Granda, rilatpunkto por la unuiĝo de la eŭropaj landoj.

SANKTA MESO EN BAZILIKO SAN GIOVANNI IN LATERANO kun vikario Angelo de Donatis

La unua paŝo de la “Iter” (vojaĝo) okazis dimanĉe la 9-an de majo je la 12-a horo en la baziliko San Giovanni in Laterano kun la meso prezidita de la kardinalo Angelo de Donatis. La pilgrimado al aliaj romaj preĝejoj komencis de la menciita baziliko. Ĉiu eŭropa lando elektis sian preĝejon pro historiaj kialoj, aŭ ĉar ĝi estas rilatpunkto por sia komunumo en la ĉefurbo. Temas ne nur pri katolikaj preĝejoj, sed ankaŭ luteraj kaj ortodoksaj, atestantoj pri la riĉa kultura kaj religia heredaĵo de la Eŭropa Unio.

Kiam finiĝis la sankta meso en Laterano, la “eŭropaj pilgrimantoj” atingis piede proksiman bazilikon De Santi Quattro Coronati, kulturdomon indikitan de Latvio.



La baziliko ĉe la sankta Klemento

EN SANKTA KLEMENTO PREĜO DE ĈEĤIO EN SIGNO DE LA SANKTAJ CIRILO KAJ METODIO

La venonta halto estis baziliko de San Clemente, elektita de Ĉeĥio: tie estas entombigita sankta Cirilo. “La sanktulo estis sendita en la 9-a jarcento de Bizanco al Granda Moravio,

kie li kun sia frato Metodio plenumis grandan misian laboron” – memorigis la ambasadoro de Ĉeĥio ĉe la Sankta Sidejo Václav Kolaja.

“Ankoraŭ hodiaŭ la preĝejo ĝuas konsideron kaj tradicie reprezentas unu el la gravaj romiaj celoj por ĉeĥaj pilgrimantoj”. En preĝejo San Clemente la gastoj estis bonvenigitaj per kantoj kaj preĝoj, estis ankaŭ ofertita gvidata vizito.

Ĉiuj preĝis kune por Eŭropo, “por ke ĝi ne forgesu fortigi kaj disvolvi penadon de la integriĝo, ankaŭ la transcendan dignon de la homo.

SANKTA STEFANO ROTONDO, “LA HEJMO” DE LA HUNGARA KOMUNUMO

La unua tago de la promenado finiĝis en Santo Stefano Rotondo, la preĝejo el la 5-a jarcento sur Celio, konsiderata hungara nacia preĝejo en Romo. La Sankta Stefano Rotondo estas ankaŭ titulara preĝejo de kardinalo József Mindszenty, la heroo primaso de Hungario, kies mortotagon oni festis la 6-an de majo 2021. Tie troviĝas la ekspozicio dediĉita al li.

La “promenado” daŭros ĝis la 27-a de junio 2021. Por venontaj sep dimanĉoj estas organizotaj aliaj etapoj de la “promenado” por viziti ĉiujn elektitajn preĝejojn. Ĉiu dimanĉo komenciĝos per la sankta meso en la nacia lingvo. Tiam oni preĝos, realigos gviditajn vizitojn ktp. Krome en ĉiu preĝejo partoprenantoj trovos informojn, kiuj klarigos ligon kaj historion inter la membroŝtato de la Eŭropa Unio kaj la Sankta Seĝo, ankaŭ kun la elektita preĝejo.

LA LASTA SANKTA MESO ĈE LA TEUTONA TOMBEJO EN LA KORO DE VATIKANO

La lasta tago kondukos ĉiujn partoprenantojn al la koro de Vatikano, al Camposanto Teutonico, la plej malnova ĝermana tombejo en Romo, kiu enhavas tombojn de altdevenaj homoj de la aŭstra, svisa, luksemburgia, belga kaj flandra originoj. En ĉi tiu rando de la tero, vojkruciĝo de historio kaj kulturo, oni celebros sanktan meson, kiu finigos la tutan “Iter” – la memoron pri la duonjarcento de la diplomaciaj rilatoj, la espero pri la estonto de ĉiam pli granda kunlaboro, por protekti tiujn valorojn, kiuj ĉiam ligis la Sanktan Seĝon kaj unuigitan Eŭropon.

Santi Cirillo e Metodio



Sanktaj Cirilo kaj Metodio

El Romo raportis Jitka Skalická

KRISTANA KONGRESO (KADRE DE 70-A KELI-KONGRESO)

Estimataj legantoj, post longa pripensado kaj diskutado la estraro de KELI kaj LKK decidis, ke nuntempaj kondiĉoj permesas organizi sekuran kongreson, kiu ne povis okazi pasintjare, se ni ĉiuj estos atentemaj, empatiaj kaj zorgos pri aliaj kunpartoprenantoj.

Ĝi okazos en la tagoj 7-14-a de aŭgusto 2021 kaj ni esperas, ke plejmulto de pli fruaj aliĝintoj povos alveni al **Legnica, Pollando**. Se iu ne volas, aŭ ne povas pro diversaj kialoj partopreni, ni petas, informu pri tio organizantojn.

Ni deziras al vi ĉiuj bonfarton kaj sanon ĝis la fino de tiu ĉi pandemio.

Invito al Legnica – al unu el plej malnovaj kaj belaj urboj de la Malsupra Silezio, kiu havas riĉan historion kaj nuntempe ĝi estas grava ekonomia, kultura kaj akademia centro en la regiono kaj Pollando.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, kiuj volas aktive pasigi tempon en kristana etoso.

Dum la kongreso, interalie, atendos vin:

- komunaj preĝoj kaj diservoj,
- komuna kantado kaj ludado,
- prelegoj kaj diskutoj,
- koncertoj,
- ekskursoj por konatiĝi kun interesa ĉirkaŭaĵo.

La favora situo de la urbo en la centro de Malsupra Silezio ĉe la vojkruciĝo de eŭropaj transportaj vojoj estas tre grava por ĝia ekonomia kaj turisma disvolviĝo. Same gravas la proksimeco al Germanio kaj Ĉeĥio.

Legnica kuŝas sur historiaj itineroj: cisterciana vojo kaj komerc-pilgrima Reĝa Vojo (Via Regia) komenciĝanta en Portugalio kaj finanta en Ukrainio. Ankaŭ hodiaŭ la urbo estas grava komunikada krucvojo: vojo kun la aŭtoŝoseo A-4 (oriente-okcidenten) kaj nacia vojo n-ro 3 (nord-suda) kaj fervojo Wrocław-Dresden (Vroclavo-Drezdeno). Pro tio ĝi estas facile atingebla de Vroclavo per trajno, kiu iras ĉiun unu horon aŭ eĉ pli ofte, aŭ de okcidenta ĉelima urbo Zgorzelec/Görlitz.

La kongreso okazos en la Alta Porpastra Seminario en Legnica.

Ĉiujn bezonatajn informojn rilate la kongreson kaj aliĝilon vi trovos en interreta paĝo: <https://keli.sea-vroc.eu> Ĉar la okazonta kongreso rapide proksimiĝas, bv. laŭeble baldaŭ aliĝi aŭ aktualigi vian pasintjaran aliĝon.

Vian baldaŭan aliĝon al la partopreno de la kongreso ĝojatendas Loka Kongresa Komitato kun ceteraj ĝiaj organizantoj.

Ĝis la revido aŭguste en Legnica!



La kongresejo - Alta Porpastra Seminario



Legnica - Katedralo de s-taj Patro kaj Paŭlo

ALEKSANDRAS DAMBRAUSKAS EN LA ANTAŬMONDMILITA AGADPERIODO VYTAUTAS ŜILAS

Teologo kaj filozofo, poeto kaj matematika-kritikisto, satirvorta publicisto kaj literatura kritikisto, poligloto kaj esperantisto-pioniro. Kiu estis tiu homo? Estis prelato **Aleksandras Dambrauskas – Jakŝtas**. Estis li ne nur la unua litovo esperantisto, sed ankaŭ la

unua en la mondo katolika sacerdoto esperantisto. Estis li persono nobla, sed kun senflata strebo al vero, tre laborema. Distingis lin flegma karaktero kaj melankoliaj trajtoj de lia temperamento. Ni konatiĝu kun biografio de tiu ĉi elstara persono.

E-pioniro A. Dambrauskas, ĉ. 1931

La literatura kromnomo de A. Dambrauskas estis – **Adomas Jakŝtas**. Tiel li subskribadis siajn litovlingvajn artikolojn. En lia naskovilaĝo loĝis kelkaj Dambrauskas-familioj. La najbaroj distingis ilin laŭ kromnomoj. Por la gepatroj “algluiĝis” la kromnomo *Jakŝtas* – tiuj ja loĝis apud rivereto *Jakŝt-upis* (Jakŝta rivero). Tial Aleksandras elektis por si la pseŭdonomon Jakŝtas. En la esperantista medio A. Dambrauskas estis konata kiel Aleksandro Dombrovski (unuobla v). Atentinde, ke li mem neniam uzis la polan



familiformon kun duobla w (*Dąmbrowski*).

La naskoloko de A. Dambrauskas estas la centra regiono de nuna Litovio (la vilaĝo *Kuronys*, paroĥejo Pagiriai, distrikto *Ukmergė*). Li naskiĝis la 8-an de septembro **1860** en kampula familio. La gepatroj Andrius kaj Kotrina (Vaičiūnaitė) parolis nur litove. Ankaŭ en la vilaĝo sonis nur la litova. Dum la deservaj tagomatenoj la tuta familio sidis ĉirkaŭtable, litove preĝis kaj preĝkantis. Estis do metita la fundamento kaj por litoveco kaj por katolikeco de Aleksandras.

Arkiva naskiĝregistro de A. Dambrauskas

Kiam Aleksandras estis dekjara, mortis la patrino. La patro edziĝis denove kaj la fileton sendis al la patrino vilaĝo. La avino kaj la onklinoj komencis instrui la boinfanon – li ricevis pollingvan preĝlibreton (litovlingvaj libroj estis ja severe malpermesitaj de la cara administraro, la mesoj estis pollingvaj). Tiel Aleksandras konatiĝis kun la pola lingvo. Unu lia onklo instruis al li la rusan. Alia lia onklo (paroĥestro) lokis lin en elemen-

tan lernejon. Tie oni instruis nur ruse (litova interparolado estas malpermesata!). Post la duonjara lernado, la knabo dum du monatoj estis trejnita de repetitoro por eniri gimnazion en la urbo Šiauliai. La instruado, kompreneble, estis en la rusa lingvo. Aleksandras estis tre kapabla kaj diligenta lernanto. Li tre multe legis. Liaj ŝatataj lernoobjektoj estis matematiko, poezio, lingvoj greka kaj franca, ankaŭ historio.

Imperatoria universitato

Jam preskaŭ 20-jara Aleksandro venis al Peterburgo por studi en fizik-matematika-fakultato de Imperatoria universitato. Ekŝajnis al li, ke matematikaj veroj posedas diecajn trajtojn: “ĉie ili – en Parizo, sur la Luno kaj sur la Marso restas eternaj kaj senŝanĝaj. Tiaj ili estis dekomence, tiaj ili restos por ĉiam”. A. Dambrauskas provis la religiajn verojn pruvi matematike kaj devis seniluziigi pri tio. Tamen, li konkludis, ke inter religio kaj matematiko ekzistas analogeco: iliaj veroj estas eternaj. Nur, laŭ li, la matematikaj veroj estas racie pruveblaj, kaj religiajn verojn oni devas kredi.

Dum la studado en la universitato A. Dambrauskas havis eblon aŭskulti prelegojn de ortodoksa teologio kaj filozofio. Kun granda intereso li aŭskultis prelegojn de

rusa religia filozofo Vladimir Solovjov. Pli poste A. Dambrauskas memstare studis liajn verkojn, kiuj traktis la ĉefajn demandojn de religio kaj kristana vivo, malkovris homan diecon kaj Dian homecon, invitis ami ĉiujn popolojn samkiel la sian. La verkoj de V. Solovjov faris grandan influon al formigo de katolikaj konvinkoj de A. Dambrauskas. Indas noti, ke la sama filozofo V. Solovjov influis ankaŭ Zamenhofon. Temas pri formigo de Zamenhofs homaranismo (la homama doktrino).

Memstare studinte teologion A. Dambrauskas konstatis, ke al li mankas profundaj teologiaj konoj. Tio instigis lin, la matematikan studenton, decidi pri elekto de pastra sorto.

Filozofo V. Solovjov, 1890

A. Dambrauskas reprenis siajn dokumentojn el la universitato, revenis Litovion kaj aŭtune de 1881 eniris la Pastran Seminarion en Kaunas. Pro siaj eksterordinaraj kapabloj li, post tri jaroj (en 1884), kun episkopa stipendio estis sendita daŭrigi la

studadon en Imperatorian Peterburgan Katolikan Eklezian Akademion. Fininte la III-an akademian kurson (en 1887) li estis ordinita diakono kaj dum la studado en la IV-a li estis ordinita pastro kaj ricevis la rangon de teologia magistro (en 1888).

Imperatoria Peterburga Katolika Eklezia Akademio nun, 2016

En 1888 magistro Dambrauskas iĝis enoficigita kapelano de reala gimnazio en la litova urbo Panevėžys. Tiutempe, dum la festotagoj de caraj familianoj, la gimnazianoj devis trude partopreni la solenan meson en ortodoksa kirko. Tamen la juna kapelano, kiu strebis protekti litovajn gelernantojn kontraŭ rusigo, venigis la katolikajn gimnazianojn al katolika preĝejo por preĝi carhonore tie... Pro tia impertinenta peko (!) la pastro Dambrauskas estis eksoficigita kaj en junio 1889 akompanita eĉ de du ĝendarmoj (!), ekzilita al Novgoroda gubernio. Ties guberniestro direktis lin por loĝi al la urbeto

Ustjujna.

En Ustjujna A. Dambrauskas tute ne atendite renkontis litovan verkiston kuraciston Vincas Pieteris. La kuracisto helpis al li trovi loĝejon. Li mem loĝis lukse en la domo de loka bonfaranta negocisto J. M. Pozdejev.

En la kuracista loĝejo anbaŭ kleruloj pasigis multajn vesperojn parolante pri historio de Litovio kaj estonto de litova popolo. A. Dambrauskas instigis sian samnacionon pri la verko de la unua litova historia romano “Algimantas” (poste prizorgis ĝian publikigon, en Usono).


La domo de Pozdejevoj en Ustjuĵna

Dum la estado en Ustjuĵna A. Dambrauskas serioze okupiĝis pri Esperanto. Kiel li fariĝis esperantisto? Ni revenu al Sankt-Peterburgo. Dambrauskas estis ĵus ekstudinta en la lasta kurso de la Eklezia Akademio, kiam la 7-an de aŭgusto 1887 aperis la unua gazeta artikolo pri Esperanto. Temas pri informativa kaj objektiva publikaĵo "Anti-Volapük" en Varsovia gazeto "Kurjer codzienny". Bal-daŭ al ĝi reeĥis, eble finseptembre,

"Gazeta Warszawska". Esperanton ĝi traktis moke kaj asertis, ke: "la ŝtelistoj en tuta mondo povos ekuzi ĉi tiun novan rimedon de interkompreniĝo por siaj internaciaj celoj". La kleriko A. Dambrauskas tralegis tiun absurdaĵon kaj reagis tute spite: "Ĉi tiu malbonintenca primoko influis al mi tute alie ol esperis la fiĵurnalisto, ĉar mi la saman tagon mendis el Varsovio la eldonon de Zamenhofa broŝuro".

Kleriko A. Dambrauskas, ĉ. 1886

Baldaŭ post la ricevo de la "Unua Libro" A. Dambrauskas skribis al Zamenhof poŝtkarton en tute korekta (!) Esperanto. Estis do la unua korespondaĵo en Esperanto, kiun ricevis ties aŭtoro! Tiel la cara ekzilito A. Dambrauskas iĝis unu el inter la unuaj personoj, kiuj ekuzis la lingvon **praktike!** Lian nomon ni trovas ankaŭ en la "Adresaro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon "ESPERANTO", Serio I. № 1 ĝis 1000", eldonita en 1889: "Dombrowski, Aleksandr, katolika pastro, Ustjuĵna, gub. Novgorod. R."



Loĝante en Ustjuĵna la pastro Dambraus-

kas ne havis eblon plenumi la pastran mision, sed okupiĝis pri kunlaborado en malpermesata litova gazetaro, eldonata en Litovio Minora (Orientprusia nordo, la nuntempa Kaliningrada regiono). Li kunlaboris kun gazetoj "Auŝra" (Aŭroro), "Tėvynės sargas" (Patruja gardanto). Tie, en la urbo Tilžė (germane Tilsit, nuntempe Sovetsk) li en prestiĝa eldonejo de Otto von Mauderode en 1894 eldonis la unuan sian litovlingvan versareton, la nelegalan "Dainų skrynelė" (Kanta skatolo). La dua eldono legale aperis en St-Peterburg (1894).

Eldonejo de O. Mauderode en Tilže (Tilsit)

La ligoj de A. Dambrauskas kun eldonantoj de nelegalaj litovlingvaj eldonaĵoj en Tilžė utilis ankaŭ por Esperanto. En la urbo Ustjuĵna A. Dambrauskas preparis lernoli-

bron de Esperanto por litovoj "Mokintuve Terptautiskos Kalbos". Ĝi aperis en 1890, en la urbo Tilžė en la presejo de Julius Schonenke.

E-lernolibro de A. Dambrauskas, 1890

Loĝante en Ustjuĵna A. Dambrauskas komencis versi en Esperanto. Novembre de 1893 li verkis versaĵon aktualan ĝis nun "Estu! Estu!". Samjare ĝi eldonis la pre-

ĝareton "Preĝareto por katolikoj" de Louis de Beaufront, eldonitan en Francio. Ekde tiam la teksto estas konata kiel poemo "Laŭdadu Dion":

Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj,
Ĉiuj popoloj laŭdu la Sinjoron!
Levu jam supren feran sian koron,

Kaj ekrekonu, ke vi fratoj veraj.
Unu vi havas civilizacion,
Teron, aeron havas ja komunan,
Super la kapoj unu globon sunan,
En la ĉielo – unu Patron – Dion.

La dua eldono de unua katolika Preĝareto de L. Beaufront

La 26-an de oktobro 1896 en rusa urbo Smolensk okazis inaŭguro de ĵuskonstruita novgotika kirko de Senpeke Koncipita Virgulino Maria. Smolenskaj esperantistoj uzis la okazon por elmontri siajn religiajn sentojn. Preninte el la “Preĝareto” la poemon “Laŭdadu Dion ĉiuj gentoj teraj”, ili verkigis muzikon por ĝi kaj en la dirita solena tago dum la Meso trakantis ĝin ĥore! Tio faris la feston pli solena. Pri la historia



evento A. Dambrauskas eksciis *post factum*, jam loĝinta en Kaunas.

La preĝkanto “Laŭdadu Dion” de A. Dambrauskas unue sonis en Smolenska katolika kirko

En Ustjuĝna A. Dambrauskas pasigis eĉ 5 jarojn.... Post la reveno al Litovio en majo 1894 la pastro longe ne rajtis okupi konstantajn oficialajn oficojn. Komence li estis kapelano de Kaŭna malliberejo, poste li oficis en malgranda malnova preĝejo de St. Gertruda, laste – sekretariis ĉe episkopo M. Paliulonis. Nur en 1898 li estis ordinata profesoro de Kaŭna Pastra Seminario. Tiam (14.01.1902) li verkis la poresperantan versaĵon “Kanto” (Nova Kanto):

Ho eksonu nova Kanto,
Pri la lingvo Esperanto!
Pri ligil` internacia,
Revo nia, amo nia!

Dum venonta la centjaro,
Kredu, esperantistaro...
Ĝin parolos ĉiu homo,
Predikisto, profesoro,
Komercento kaj doktoro,
Kaj hebreo kaj kristano,
Kaj litovo kaj japano.

Por ke venu tiu horo -
Kune, fratoj, al laboro!
Jen per kanto, jen per vorto,

Jen agante ĝis la morto.
Iru kiel apostoloj
Ĝin anonci por popoloj,
Kaj eksonu nia voko,
Sur la ter` en ĉiu loko!

Virina instituto de princino Ksenia

En la jaro 1902 la rusa potenco iĝis iom pli indulgema al la pastro prof. A. Dambrauskas kaj konsentis pri lia eklaboro en la Peterburga Eklezia Akademio. En la Akademio A. Dambrauskas prelegis la Bibliion (la Testamentojn). Krome, li instruis religion en du porvirinaj St.-Peterburgaj institutoj (en la

Ksenia kaj la prestiĝa Elizabeta institutoj). Malgraŭ ŝarĝo de multa laboro li sukcesis ankoraŭ partopreni la agadon de la litova urba komunumo! La akademia ĉefaro ordinis lin profesoro kaj taksis liajn meritojn per la honoraj Kruco kaj ordeno de St. Anna.

Nobela instituto de princino Elizabeta

La Peterburga vivoperiodo de A. Dambrauskas manifestiĝis ankaŭ en lia aktiveco por Esperanto. Li membriĝis en la Peterburga Societo "Espero". La societo estis la unua oficiala E-organizaĵo en Ruslando, registrita de Ministerio pri Internaj Aferoj en la jaro 1892 (fondita en 1901).

Por la 10-jara jubileo de la societo A.

Dambrauskas dediĉis la poemon "Nova Kanto" (Kanto). Por ĝi la muzikon verkis komponisto de religia muziko, orgenisto de Kaŭna katedralo Juozas Naujalis. Estis li komponisto de la ĝis nun populara en Litovio la preĝkanto "Pulkim ant kelių" (Surgenuiĝu). Tiun kanton bonege esperantigis konata litova esperantisto Petras Čeliauskas.

Komponisto J. Naujalis

En la jaro 1903 profesoro de la Eklezia Akademio A. Dambrauskas verkis en Esperanto la versan gratulon por novelektita Papo Pio X-a: "Al Lia plej sankta Moŝto". La dediĉa gratulo aperis frontpaĝe de la unua numero de la revuo "Espero Katolika" (1903). Poste, dum la aŭdienza akcepto de

esperantistoj la 1-an de junio 1906, ĝi estis prezentita al Lia Sankteco ankaŭ kune kun la tuta kolekto de la revuo. Al la vizitintoj la Papo respondis per lakona danko kaj beno kaj de tiam li ĉiujare sendis siajn gratulojn al katolikaj E-kongresoj (same faris ankaŭ papoj Benedikto XV-a kaj Pio XI-a).

Grincu per dentoj infera serpento!
Nin ne timigas jam via envio:
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio!

Tial laboru sen tim` kristanaro,
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio,
Unu paŝtanta kaj unu ŝafaro ...
Gvidu ĝin Pio!

(18.09.1903)

Revuo Espero Katolika. Versgratulo al Pio X-a

La tuta mondo kun belaĵoj siaj:
Bruo arbara, dolĉaj birdaj kantoj,
Verdaj herbetoj, ludoj papiliaj,
Nuboj migruloj, tra ĉiel' flugantaj;
Kaj la taga lumo kaj la noktmistero,
Freŝa herbejo plena je odoro –
Ĉio mormuras al ni sur la tero:
Homo: memoru, estas Di' Sinjoro!

La jaro 1905 estis, ĝenerale, eventoriĉa jaro. Aŭgure estis jam permesita enlanda eldonado en la lingvoj litova kaj ukraina. En januaro okazis la 1-a Revolucio, kiu skuis la rusan monarkan reĝimon. Malsukcese por Rusia Imperio daŭris la Rusa-japana milito (ĉesis finaŭguste). Estis la jaro de ekvigliganta internacia E-agado kaj la jaro de la okazonta unua Esperanto-Kongreso.

En marto 1905 A. Dambrauskas verkis kelkajn movadajn versaĵojn. En la versaĵo “Solvita demando” li konstatis:

Dank` al Dio sonas mia kanto,
Dank` al voĉo mi ne estas muta,
Sed dank` al la bela Esperanto
Mi parolas kun la mondo tuta.

La 5-12-an de aŭgusto en la nordfranca urbo Boulogne-sur-Mer (Bulonjo) okazis la 1-a Universala Kongreso de Esperanto. Estis eminentaj tagoj en la historio de Esperanto. Inter nemultaj ruslandaj esperantistoj estis ankaŭ A. Dambrauskas.

Maje 1905, antaŭ la unua E-kongreso do A. Dambrauskas verkis la Himnon, “dediĉitan al la internacia esperantista kongresanaro en Boulogne-sur-Mer”:

El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj,
Ni kunvenintaj Vin adoras Di`!
Al vi sin turnas niaj piaj sentoj,
Kaj nia kanto sonas nur al Vi!
Ho, venu tiu hor` de unueco!
Rompon, dividon amas nur satan`...
Patro, ni preĝas Vin pri la frateco,
Nian laboron benu Via man`! ...
Laŭ Via diro: ekposedu Teron!
Ni ĝin okupis kaj posedas nun;
Transnaĝas marojn, sondas atmosferon,
Kaj ĉie loĝas, kie brilas sun`.

Partoprenantoj de 1-a UK en Bulonjo

Dimanĉon, la 6-an de aŭgusto, en la urba preĝejo de St. Nikolao okazis la unua internacia katolika di-servo en Esperanto. Al ĝi estis invititaj ĉiuj kongresanoj, sendepende de iliaj kredkonfesoj, ankaŭ L. Zamenhof ĝin ĉeestis. En la kongreso A. Dambrauskas havis la okazon persone konatiĝi kun la aŭtoro de Esperanto! Dum la solena diservo oni kantis diversajn komponaĵojn en Esperanto. Ankaŭ “la belan himnon porokaze verkitan de pastro Dombrovski el Peterburgo.

El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj Ni kunvenintaj Vin adoras, Di` “. La muzikon komponis s-ino Josée Guivy el Tours (la Himno estis publikigita de Presa Esperantista Societo en Parizo en 1907).



La dua eldono de la unua katolika Preĝareto de L. Beaufront

En la kongreso estis elektita Provizora Kongresa Komitato, “en kies anaron eniris prof. Dombrovski (St.-Peterburgo)” kaj la ĉefa internacia Esperanta institucio Lingva Komitato (formita 08.08.1905 por kontroli lingvan evoluon). La komitato konsistis el 98 komitatoj. Inter ili unu litovo (!) – Dambrauskas. Kiam aperis proponoj pri ŝanĝoj en la lingvo Esperanto, A. Dambrauskas defendis la pozicion de lingva stabileco.

Prof. de la Peterburga Eklezia Akademio A. Dambrauskas estis aktiva membro en la St.-Peterburga societo "Espero". Reveninta post la Bulonja kongreso li estis elektita prezidanto de la societo.

Ni kelkvorte tuŝu la demandon pri A. Dambrauskas kaj la organo de la societo "Ruslanda Esperantisto". La 11-an de januaro 1904 la profesoro A. Dambrauskas gvidis ĝeneralan membro-kunvenon de la societo, dum kiu estis decidite pledi antaŭ certaj rego-instancoj pri permeso eldonadi periodaĵon en la lingvo Esperanto, kiu estu

oficiala organo de la societo. La penoj sukcesis kaj finrezulte en 1905 komencis aperadi la revuo "Ruslanda esperantisto".

Ni scias ankaŭ pri la letero de la societa prezidanto A. Dambrauskas al la Ĉefa Cenzura Administracio (GlavLit) pri pli ofta eldonado de la revuo "Ruslanda Esperantisto", en kiu estas la vortoj: "Mi havas la honoron peti je la nomo de la societo "Espero" pri ĉiusemajna eldono de la revuo "Ruslanda Esperantisto". La peto estis kontentigita. La revuo, tamen, restis monata.

La revuo „Ruslanda Esperantisto”, 1905

En „Ruslanda Esperantisto” Nr.1 1906 L. Zamenhof kaŝnome publikigis longan artikolon "Dogmoj de hilelismo", en kiu li prezentis sian religiecan kaj filozofian doktrinon (instruon) nomita *Homaranismo*. Li klarigis, ke *homaranismo* celas al pura homeco: „instigante komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco“. Krei la instruon *Homaranismo* al L. Zamenhof inspiris verkoj de hebrea ekleziulo Hilel (samtempulo de Jesuo) kaj rusa religia filozofo V. Solovjov. La aŭtoro de *Homaranismo* L. Zamenhof estis konvinkita, ke ĉefaj kaŭzoj de ĉia malpaco inter la popoloj estas la etnaj, lingvaj kaj religiaj diferencoj kaj por solvi tion li proponis ideologion de hilela homaranismo.

Al la ekleziulo prof. A. Dambrauskas, tamen, ekŝajnis, ke L. Zamenhof celas krei novan religion kaj li en la Nr. 3 de „Ruslanda Esperantisto“ aperigis malkontentan artikolon pri homaranismo („Kelkaj demandoj pri hilelismo“). Li rimarkis, ke:

„Pozitiva valoro de hilelismo konsistas en tio, ke ĝi igas ĉiun homon pensantan difini siajn rilatojn: *al si mem, al Dio, kaj al siaj proksimuloj.*” [...] “Sed la hilelismo volante esti sistemo supernacia kaj superreligia, fariĝas bedaŭrinde kontraŭnacia kaj

kontraŭreligia. [...] La iniciatoroj de hilelismo opinias, ke la kaŭzoj precipaj de nuntempa societa malbono en la tuta mondo estas la diverseco de lingvoj kaj religioj. Granda eraro. La multlingveco kaj diversreligieco estas ne *kaŭzoj*, sed nur *pretekstoj* de militoj kaj persekutadoj.”

L. Zamenhof esplikis siajn dogmojn en la kvara numero per la respondo „Pri la homaranismo. Respondo al P-ro Dombrovski“, subskribinte „Homarano“. Estus interese ĉi tiun dialogon iam pritrakti el la teologia vidpunkto.

En 1906 A. Dambrauskas forlasis la profesoran kaj prezidantan postenojn (en la Eklezia Akademio kaj en la societo "Espero") kaj revenis Litovion. La revenon kaŭzis la deziro serioze okupiĝi pri demandoj de renaskiĝanta litova nacia kulturo. Reveninte li fondis kaj ĝismorte gvidis porkristanan St. Kazimiran libroeldonan societeton (St-Kazimira Societo), fondis kaj redaktis la revuon "Draugija" (Kunestado, ekde 1907). Li estis unu el la fondintoj kaj agantoj de la Asocio de Kristanoj Demokratoj (1905). Loĝanta en Kaunas A. Dambrauskas ne ĉesis okupiĝi ankaŭ pri Esperanto. Agis li kaj en la nacia kaj en la internacia skalo.

La teologon A. Dambrauskas ĉiam interesis la problemo de konveneco de scienco

kaj kredo. Pri tio li en 1908 (en Kaunas) publikigis filozofian 215-paĝan eseon pri Scienco kaj “Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj” – en Esperanto.

Dum la 5-a UK en Barcelono (5-10 de septembro 1909) okazis kelkaj kunvenoj de katolikaj kongresanoj. A. Dambrauskas, ne povinta veni Barcelonon kaj partopreni la kunvenojn persone, sendis el Litovio al ili, “honorindaj kongresanoj”, elokventan leteron kun la “epokfara propono” pri neceso krei tutmondan katolikan E-organizaĵon. Ĝi estis voĉlegita:

“Estimataj geanoj en Esperanto kaj karaj gefratoj en Kristo, Ĉu ĝi nomiĝos «Internacia Katolika Esperantista Unuiĝo», ĉu alie, tio ĉi estas ne grave... ĝi devas plej bone respondi al la nuntempaj bezonoj de la katolikaro... Mi sentas ĝian senprokrastan bezonon kaj estus vere feliĉa, se vi, estimataj kongresanoj, ĝin pripensu, preparolu kaj fondu”.

La propono de A. Dambrauskas estis akceptita unuanime! Oni ellaboris projekton de regularo de “Katolika Unuiĝo Esperantista” (KUE), publikigis ĝin en la revuo “Espero

Katolika” kaj decidis pri la unua Katolika Esperanto-Kongreso. En 1910, kiam en Parizo okazis la I-a Esperantista Katolika Kongreso kaj la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) fondiĝis definitive, A. Dambrauskas forestis. La II-a Katolika Kongreso okazis en Genevo (1906). A. Dambrauskas forestis ankaŭ tie.

Somere de 1912 okazis du gravaj E-kongresoj. La 11-18-an de aŭgusto en tiam aŭstria Krakovo okazis la 8-a UK kaj sammonate la 17-23-an en Budapeŝto la III-a Esperantista Katolika Kongreso. A. Dambrauskas iris al Budapest. Laŭvoje al la Katolika Kongreso li faris viziton al L. Zamenhof en ties varsovia hejmo (Dzika str. Nr. 9). Verŝajne tuj antaŭ la Krakova UK.

Dum pli ol hora interparolo en Esperanto, L. Zamenhof diris kelkajn frazojn en la litova lingvo. Pri tio A. Dambrauskas skribis subtitole “Miaj rilatoj kun D-ro L. Zamenhof” (litove, libr. Užgesę žiburiai. Biografijų ir nekrologų rinkinys, 1930), bedaŭrinde, sen la enhavo de la interparolo. La renkontiĝo, tamen, confirmis la supozon, ke L. Zamenhof la litovan lingvon iom scipovis.

Partoprenantoj de la III-a Esperantista Katolika Kongreso en Budapeŝto

E-gravuloj de la kongreso: A. Dambrauskas, Claudius Colas (organizinto de la 1-a Katolika Kongreso), abato Austin Richardson (prezidanto de IKUE), prelato Sandor Giesswein (prez. de Hungarlanda E-Asoocio), paroĥestro Jakobo Bianchini (membro de Lingva Komitato).

En Budapeŝto A. Dambrauskas estis tre honorata, tamen detaloj pri lia partopreno, ho ve, forestas. Pri la kongreso raportis la oktobra numero de *Espero Katolika* (1912), sed mi tiun numeron interrete ne trovis.

A. Dambrauskas estis aktiva partoprenanto de E-kunvenoj en Kaunas. Januare 1910 li en Kovna E-societo legis la raporton “Esperanto kiel scienca helpilo”. Septembre

1912 li komunikis pri paso de la III-a Esperantista Katolika Kongreso en Hungario. Sendube, ankaŭ pri sia renkontiĝo kun L. Zamenhof.

A. Dambrauskas elstaris ne nur en la internacia, sed ankaŭ en la loka skalo. Povas esti, ke li estis unu el la iniciatintoj de Kovna Esperanto-societo, registrita la 18-an de decembro 1909 (kune kun Aleksandr Nedoviŝin kaj bofratino de Zamenhof Tereza Kocin). La prezidanto estis financisto A. Nedoviŝin, la vicprezidanto dum la oficperiodoj 1910-1912 estis prelato A. Dambrauskas. Li daŭre klopodis pri kresko de esperantistaro en Litovio.

Instruisto Stasys Tijūnaitis informas, ke

en 1910 (14.02.1910) A. Dambrauskas sendis al li leteron kun la instigo senprokraste verki novan lernolibron de Esperanto, ĉar la lia “Mokintuve terptautizkos kalbos D-ro Esperanto” jam malnoviĝis. La St. Kazimira societo en la urbo Seinai (nun Sejny, Pollando) eldonis la novan lernolibron jam en 1912 kun la noto litovlingva: “Redaktis kaj antaŭparolon aldonis pastro A. Dambrauskas, vicprezidanto de Kaŭna Esperantista Societo”. Cetere, verkante la lernolibron S. Tijūnaitis konsultiĝis kun L. Zamenhof mem.

E-lernolibro S. Tijūnaitis, eldonita en Seinai

A. Dambrauskas traktis temojn historiajn, ekonomiajn, jurajn, moralajn kaj etikajn kaj verkis beletrajn, teologiajn, filozofiajn kaj sciencajn artikolojn en kvin lingvoj: la litova, pola, rusa, latina kaj Esperanto. Scipovis li pli multajn lingvojn – ankaŭ la lingvojn francan, germanan, hebrean, helenan (grekan) kaj hispanan.

A. Dambrauskas kontribuis al jenaj gravaj E-periodaĵoj: *L'Espérantiste* (Parizo), *Lingvo Internacia* (Upsalo), *La Revuo* (Parizo), kaj *Literaturo* (Londono). Menci-



A. Dambrauskas en ĉ. 1908

indas kelkaj liaj matematikaj verkoj: „Pri unu speco de kurbaj linioj, koncernantaj la Van Euklidan postulaton“ (Berlin, 1905) kaj „Pri novaj trigonometriaj sistemoj“ (Berlin, 1906; france – en 1908 en Belgio).

Prelato A. Dambrauskas

A. Dambrauskas estis elstara persono ne nur por litovoj, sed ankaŭ por esperantistaro. Estis malfacile prezenti lin pli-malpli dece eĉ limiĝinte nur je esperantistaj temoj kaj eĉ je la aparta lia vivoperiodo – la rusa regpotenco. Alia problemoj estas mala – la manko de fota materialo – ja A. Dambrauskas ne ŝatis fotiĝi...

Post la reveno el St.-Peterburgo al Litovio A. Dambrauskas ĝis la morto (en 1938) loĝis en urbo Kaunas, en la sama loĝejo (*Rotušės* placo 23), krom la militaj jaroj. Aŭguste de


1914 Rusa Imperio atakis Germanan Imperion. La rusa armeo invadis nordan Orientprusion. Tiel komenciĝis la I-a Mondmilito. Germanoj sukcese kontraŭatakis. Septembre en la garnizona urbo Kaunas estis enkondukita milita stato. Laŭ la ordono de urbestro Nik. Grjazev prelato A. Dambrauskas, kiel persono danĝera al la rusa reĝimo, estis devige translokigita al urbo Vilno. Tie li restis ĝis oktobro 1915 (1915.X.10), kiam germanoj okupis tiun ĉi urbon. Reveninte al Kaunas, li prelegis filozofion en Porpastara Seminario.

Kaunas. La domo, kie loĝis A. Dambrauskas kaj lia memortabulo

La memortabulo por A. Dambrauskas estas el la jaro 1989, skulptita fare de Vl. Žuklys.

La unua mondmilito interrompis multajn intencojn de prelato A. Dambrauskas. Li konkludis: laboron pli bone ne komenci, ol ne fini ĝin. Tamen, dum tiu ĉi severa milita tempo li ne sidis kun ligitaj manoj: li verkis lernolibron de trigonometrio por litovaj lernejoj. En 1919 li eldonis sian lernolibron de logiko, la unuan tian en la litova lingvo.

En postaj jaroj A. Dambrauskas, plu agis pri disvolvo de litova religia kulturo, fortigo de katolika mondkoncepto kaj restis aktiva esperantisto.



La unuaj ege aktivaj katolikaj esperantistoj estis la litovo Aleksandras Dambrauskas (1860-1938) kaj la franco Franzose Louis de Beaufront (1855-1935). Dambrauskas eksciis jam en 1887 kiel studento en la pastra akademio de Sankt-Peterburgo pri la apero de Esperanto. Li mendis ĉe Zamenhof la “Unuan Libron” kaj entuziasme komencis lerni la novan lingvon. Jam post unu semajno li skribis al Zamenhof sian unuan poŝtkarton en senerara Esperanto. Dambrauskas verkis la unuan lernolibron de Esperanto por litovoj. Ĝi aperis en 1890 en Tilsit (Germanio), de kie oni kontrabandis ĝin al Litovio, ĉar ĝis 1904 la cara registaro malpermesis al litovoj eldoni verkojn en sia gepatra lingvo. Eĉ Zamenhof, vivanta en la tiutempe rusa urbo Varsovio (respektive de 1893-1897 en Grodno) aŭdacis nur kaŝe oferti la libron al vendado. “Pro kialoj, kiujn vi kredeble scias (niaj leĝoj ne permesas litovajn librojn kun latinaj literoj), la libro devas figuri en la ‘Nomaro de verkoj’ kiel ‘Nericevebla’”, li skribis al Dambrauskas en 1896.